



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
96-a jaro • n-ro 1163 (10) • **Oktobro 2003**

Iranaj esperantistoj sur la monto Damavand (5 641m)



**Kiel kunlabori
bonetose?**

**Ni sukcesas
malgraŭ pesimistoj**

**Nia anonima
movado**

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎, ✉ +421 43 4222 788
✉ revuo@uea.org; revuo@nextra.org

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 32); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kosta EUR 3,00.

Anoncartarifoj (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kosta duoble. Rabato por tua ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam (IBAN: NL24PSTB0000378964 SWIFT: PSTB NL21)

42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank, Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam (IBAN: NL66ABNA0426051599 SWIFT: ABNA NL21)

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

☎+31-10-436-1044, ☎+31-10-436-1751, ✉ uea@inter.nl.net

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Trevor Steele.

Vi trovos...



Tiujn ĉi liniojn mi tajpas ĉiam kiel la lastajn, antaŭ transdono de la numero al la preseo. Ankoraŭ plena de impresoj, kiuj vin, kara leganto, nur atendas. La miaj nun estas bonaj kaj fortaj. Varmigas min la impreso, ke mi sukcesis kolekti bonan kaj valoran materialon. Mia (espeble ankaŭ via) dankemo iru al la aŭtoroj. La ĝisnunaj – kaj la estontaj. Ĉu ankaŭ vi apartenas – aŭ emus aparteni al ili? Kial ne provi tion?

G. H. P.

Enhavo

- 195 Malferme: Ni sukcesas, kiom ajn oni volas esti pesimisto (Renato Corsetti).
- 196 Esperanto en la reto: Kvanto kaj kvalito (Marko Naoki Lins).
- 198 Kiel kunlabori bonetose? (Hokan Lundberg).
- 200 Nia anonima movado (Jardar Eggesbø Abrahamsen).
- 201 Malegaleco de la gepatra lingvo. Eŭropa Jaro de Handikapitaj Personoj. Deklaro okaze de la Eŭropa Jaro de Handikapitaj personoj (Marko Naoki Lins).
- 202 EL LA POŝTESTO: Gratulon kaj dankon al la prezidanto! Kiel multobligh la membraron de UEA? Repaciĝo laŭ Zamenhof. Repaciĝo per kunlaboro.
- 203 Novaj Honoraj Membroj. Internacia Kongresa Universitato.
- 204 Navige Tra TTT-paĝoj. La lingvo de skrablo (Dafydd ap Fergus).
- 205 La Novembra Malferma Tago. Kotiztabelo de UEA por 2004.
- 206 RECENZOJ: Bertilo Wennergren pri *Studoj pri Interlingvistiko/Studien zur Interlinguistik*. Esperanto-dokumento pri interlingvistiko.
- 207 Reinaldo Marcelo Ferreira pri *Realigas la mondan pacon la Bahaa kredo kaj Esperanto*. Máire McKay pri *Ramona van Dalsem kantas 23 elektitajn kantojn*.
- 208 Jorge Antonio Leoni de León pri *Fakaj studoj en Esperanto*. Ĉu tamen *Fundamento* en modernaj vestoj?
- 209 LASTE APERIS.
- 210 LOKE, FAKKE.
- 211 OFICIALA INFORMILO. ANONCETOJ.
- 212 TRA LA MONDO: Primavero en Tobolsk (Rafija Kudrjavceva). Prilepa Foiro (Viktor Galeski).
- 213 Konsultigo en Meza Eŭropo (Stanislaw Mandrak). La Unua Nordorientĉina Kongreso (V. Kanto).
- 214 FORPASOJ. Kruĉnigma konkurso.

KOVRIPLAĜE: 14 esperantistoj el Irana Esperanto-Centro sukcesis supreniri la 1-an de aŭgusto 2003 la plej altan monton de Irano Damavand (alteco: 5 641 m).

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (strategia forumo, strategio kaj planado, Unesko): d-ro Renato Corsetti, Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎+39-06-957-57-13; ✉+39-06-957-66-33; ✉ renato@esperanto.org.
Vicprezidanto (kulturo, esploro kaj dokumentado): prof. Humphrey Tonkin, 279 Ridgewood Road, West Hartford CT 06107, Usono; ☎+1-860-561-26-69 [h]; ✉+1-860-561-52-19 [h]; ☎+1-860-768-44-48 [of]; ✉+1-860-768-44-11 [of]; ✉ tonkin@mail.harford.edu.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj): Prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Resp.; ☎+82-53-765-0880 [h]; ✉+82-53-652-4488 [of]; ✉+82-53-652-8141 [of]; ✉+82-53-765-0881 [h]; ✉ lee@esperanto.net.

Ĝenerala sekretario (faka agado, rilatoj kun la Komitato, kongresoj, Nobel-kampanjoj): s-ro Ivo Osibov, Vinkovačka 25, HR-21000 Split, Kroatio;

☎+385-(0)21-535-650 [h]; +385-(0)21-355-550 [of]; ✉+385-(0)21-393-597 [of]; ✉ osibov@pravst.hr.

Financo, administrado: s-ino Ans Bakker-ten Hagen, Kastelenstr. 231-11, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; ☎+31-(0)20-642-18-53; ✉ ans.bakker@esperanto.org.

Ĝenerala, ILEI-rilatoj, sporto, afrika agado: s-ro Gbego Koffi, B.P. 13169, Nyekonokpoe, Lomé, Togolando; ☎+228-227-21-17; ✉ esp.togo@cafe.tg.

Informado, rilatoj kun TEJO: s-ro Andrej Grigorjevskij, ul. Lenina 40-14, RU-429120 Šumerlja, Ĉuvaŝa Respubliko, Rusio; ☎+7/83536/59856; ✉ volg@uea.org.

Landa agado: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-06-39-72-61-98; ✉+39-06-39-72-61-69; ✉ michela.lipari@esperanto.org.

Observanto de TEJO: Sonja Petrović.

Observanto de ILEI: Radojica Petrović.

Malferme

Ni sukcesas, kiom ajn oni volas esti pesimisto

Renato Corsetti

Neniam antaŭe en mia esperantista vivo mi vidis tiom da gazetaj artikoloj en tiom da gravaj gazetoj, favoraj al Esperanto. Sukceso, kiel oni scias, havas multajn patrojn, kaj efektive ĉi tiuj sukcesoj en la informa kampo havis multajn kaŭzojn kaj multajn laborantojn. Certe la atento al informado de la Komitato de UEA, kaj sekve de la Estraro, helpis. Certe la kuraĝa starigo de la Brusela Komunikad-Centro fare de Eŭropa Esperanto-Unio helpis. Certe la decido de nia japana mecenato Etsuo Miyoshi pagi por tupaĝaj anoncoj en grandaj ĵurnaloj helpis. Sed same multe helpis la informa laboro de landaj asocioj kaj de lokaj grupoj, kiu en multaj kazoj ankaŭ rezultigis artikolojn en grandaj gazetoj (mi menciis *The Guardian*).

Alia rakonto pri sukceso rilatas al la rimarkinda kvanto da homoj, kiuj volas lerni Esperanton. Tro multaj homoj volas lerni Esperanton. Tro multaj estas, evidente, relativa esprimo, rilatanta al la nombro de ekzistantaj esperantistoj, aŭ, se vi preferas, al la nombro de tiuj, kiuj volas ĉeesti kurson. Kie ajn ni rigardas en la komputila mondo, mi vidas elkirojn kaj alvokojn de la prizorgantoj de retaj kursoj, kiuj serĉegas pli da helpantoj, por gvidi la tro multajn aliĝantojn al la kursoj. En la antaŭaj dek tagoj (mi skribas en la mezo de septembro) ekzemple mi vidis ion tian, venantan de la prizorganto de la itala reta kurso (14 homoj aliĝis en unu tago, helpu!) kaj de la germana reta kurso (germana versio de la kurso de Carlos Pereira). Tamen tiuj help-krioj iĝis parto de nia pejzaĝo: estas tro multe da lernantoj, kompare kun spertaj esperantistoj pretaj gvidi ilin. Kaj kion diri pri la ĝentila kaj eterne juna Wil van Ganswijk-Vlasblom, kiu per sia hejmpaĝo, farita por ŝi de la filo, malfermis iom hezite eblon lerni Esperanton. Nederlandanoj kaj belgoj ekuzis tiun eblecon kaj ŝi trovis sin inundita de diversaĵuloj, kiuj volas lerni la internacian lingvon. Temas pri vera frenezajo, apenaŭ imagebla anticipe. Mi ne citas al vi ĉiujn mallongigojn, kiuj aperas pli kaj pli ofte en ĉi tiu kampo, de www.edukado.net (ĉio, kion instruisto povas deziri) al www.lernu.net (la kurso de gejunuloj por gejunuloj), ktp. Ĉu temas pri la fina venko? Tute ne, kompreneble! Sed temas pri bona situacio. En mia tuta esperantista vivo (por reuzi jam uzitan esprimon) mi havis la malan problemon: tro multe da esperantistoj en la loka klubo, kiuj amasiĝis por instrui ĉirkaŭ tro malmulte da kursanoj.

Do, tiuj rakontoj mi utiligas nun por instigi vin plulabori en la kampo de informado kaj instruado. Neniu ĉef-informisto povos fari por vi vian laboron. La sukceso de la gazetara kampanjo ĉirkaŭ la Universala Kongreso ŝuldiĝas certe al la Brusela Komunikad-Centro, kiu centre gvidis ĝin, sed same multe ŝuldiĝas al la kunlaborantoj tra la unuopaj landoj, kiuj tradukis, adaptis, dissendis. Neniu artikolo aperis en Etiopio, ĉar neniu etiopa esperantisto kunlaboris. Ĉu la mesaĝo estas klara? Ĉiuj landaj asocioj starigu kaj funkcigu sian informan fakon! Same, kiam temas pri instruado kaj kursoj, eble ni devas repensi niajn strategiajn kaj alirojn, kaj en la landoj teknologie pli progresintaj, kaj en la aliaj. La sukceso devigas nin adaptiĝi al la mondo. Ni

ĉiuj devas helpi la instruistojn, ILEI, fortikiĝi kaj respondi je ĉi tiuj defioj. Instruado estas la dua prioritato de la labor-plano, pri kiu mi volis paroli al vi. Mi parolu al vi ankaŭ pri alia prioritato: tutmondiĝo. Danke al la laboro de niaj antaŭuloj ni estas ĉiam pli ĉeestaj en ĉiam pli da landoj. Mia koro sangas (temas pri metaforo sed ne tro malproksima de la realo) pro tio, ke neniu esperantisto estas en Etiopio aŭ en Indonezio, sed la grandaj landoj en kiuj ne estas esperantistoj fakte reduktiĝis al eble dek. UEA ricevas invitojn aranĝi Universalaĵn Kongresojn en multe pli da ekstereŭropaj landoj, ol ĝi povas akcepti. Eble baldaŭ oni devos ŝanĝi la regulon kaj kongresi en Eŭropo pli malofte. Rapide almarŝas la momento de la unua UK en Afriko kaj nur la manko de taŭga kongresejo iom bremsas la aferon.

Plijunio estas alia prioritato de la labor-plano kaj la nova TEJO-estraro ŝajnas serioze pripensanta ĝin kunlaboro kun la UEA-estraro. Kunlaboro estas la ŝlosila vorto, kiu malkongruas kun *ni*, la *gejunuloj*, *pensis kaj vi pagu* (estas vero, ke gejunuloj pensas pli bone ol ni ĝenerale, sed ni eble ne ŝatas esti emfazite atentigitaj pri tio). Pri la aliaj prioritatoj, utiligado kaj profesioj, mi parolos al vi en alia artikolo. Por ne tro longigi ĉi tiun.

Fronte al ĉi tiu kuraĝiga situacio restas la kutimaj problemoj. Lernantoj en la reto ne volas pagi kotizojn. Oni devas trovi manierojn ligi ilin al la movado sen kotizoj kaj igi ilin subteni la movadon pagante por servoj aŭ pro entuziasmo pri difinitaj projektoj. Mi intense cerbumas pri tio sen grandaj rezultoj (vi rajtas primoki min nur se vi pretas ne konsili min, sed mem realigi ion ĉi-rilate kunlaboro kun UEA). Miaj pensoj ŝvebas ĉirkaŭ www.xgango.com kiel hejmo por la reta komunumo, kaj mi jam starigis kaj eksperimentis retan liston, la-komunumo@yahoogroups.com, kiu pretas akcepti retadresojn de esperantistoj depende de tio, ĉu ili pagis kotizon al iu Esperanto-istanco, loka, nacia aŭ internacia, aŭ al neniu. Ĝi ankaŭ povus akcepti cotojn da ret-adresoj venantaj de landaj asocioj. Se vi interesiĝas, kontaktu min.

Mia penso ŝvebas ankaŭ ĉirkaŭ la Afrika kaj la Amerika Oficejoj, kiuj iel povus iĝi kunordigitaj de nepagopovaj esperantistoj en siaj kontinentoj. Ili, kompreneble ne ricevas la nunan revuon, sed ion alian por kiu ili ja povus pagi.

Sed, kiel ajn vi volas rigardi la aferon, la situacio de Esperanto en la nuna momento estas bona. Ni ĉiuj estas morale devigitaj konstrui sur tiu situacio harmonie. Ni ne kverelu inter ni sed ni provu uzi tiun energion por konvinki neesperantistojn. Ili ŝajne pretas.



Kvanto kaj kvalito



En marto 2003 la retejo de Sveda Esperanto-Federacio registris sian 5-milionan vizitanton. Dum la lastaj jaroj iom pli ol miliono returnis en ĝiaj paĝoj ĉiun jaron. Ĉu svedoj estas superaveraĝe sukcesaj informantoj pri Esperanto? Ĉu unikaĵo? Ĉu konstateblas ĝenerala prijuĝo? Kia estas la kvanto da vizitoj kaj la diferenco inter *grandaj* kaj *etaj* Esperanto-retejoj? Dank' al dekoj da respondoj de retejaj prizorgantoj eblas nun doni superrigardon, kiu ne pretendas esti reprezenta, ĉar ĝi tuŝas nur parteton de la tuta fenomenon *Esperanto en la reto*.

La gigantoj

Ĉe la pinto de la gigantoj oni atendus la retpaĝaron de Universala Esperanto-Asocio, sed UEA mistrafas la unuan pozicion sufiĉe klare. **Esperanto.net**, redaktita de UEA, havas averaĝe pli ol 30 000 vizitojn monate. Nia propra ejo **UEA.org** averaĝe 11 000 monate dum la pasintaj 12 monatoj, diras Andrej Grigorjevskij, UEA-estrarano pri informado. Pri la prizorgado de la vaste publikigita retejo *Esperanto.net* Grigorjevskij asertas: Nia unua celo estis revivigi, modernigi kaj aktualigi la retejon. Tio pli-malpli estas atingita. Nun la ĉefa tasko estas daŭre teni la retejon aktuala, samtempe pliriĉigante ĝin. Por tio bedaŭrinde ekzistas nenioj rimedoj, krom kunlaboremo de niaj bonegaj volontuloj. Renato Corsetti, prezidanto de UEA, donas al la prezentigo en la interreto kaj la informado per ĝi relative grandan signifon: Nuntempe ni evidente ne volas malatenti niajn senkomputilajn membrojn, sed ni provas kontentigi ankaŭ la komputil-havajn.

Ĉe serĉado de la vorto *Esperanto* la retejo *Esperanto.net* estas montrata sur la unua pozicio de la plej grandaj serĉmaŝinoj kiel Google, AltaVista kaj Yahoo.

La retejo nun prezentas informojn pri Esperanto en 57 lingvoj de la mondo kaj ilia nombro daŭre kreskas kaj sekve ankaŭ la graveco de la retejo, opinias Dafydd ap Fergus, estro de la Brusela Komunikadcentro. Kritikantoj opinias, ke UEA ne donas sufiĉe da atento kaj rimedoj al tiu grava ejo, kiu estas por amaso

da personoj la unua kontakto kun la (virtuala) Esperanto-mondo. Malgraŭ la kritiko *Esperanto.net* povas registri daŭre kreskantan nombron da vizitantoj. Rimarkeble plimultiĝis vizitoj al **Esperanto.net** en la dua duono de decembro. Tiam la retejon vizitis 45 000 personoj, anstataŭ averaĝaj por lastaj monatoj de la 2002-a 32 000. En januaro estis 34 000, laŭ Grigorjevskij.

Male al *Esperanto.net* la celgrupo de UEA.org estas por jam-esperantistoj interesigantaj pri la Universala Kongreso, retaj aliĝiloj, librokatalogo kaj manieroj (re)membrigi en UEA. Grigorjevskij detalias: Averaĝe **UEA.org** estas vizitata ĉiumonate de 13-15 000 personoj kun kreskanta tendenco. Tio estas duoble pli ol dum la respektiva periodo antaŭ unu jaro. Kaj Corsetti aldonas: Fakte **UEA.org** estas en fazo de rearanĝado por atingi la saman nivelon kiel **Esperanto.net**, sed en sia kampo: informado al esperantistoj.

UEA.org komence de aprilo efektive ŝanĝis draste la enhavon kaj aspekton. Laŭ Grigorjevskij, la navigado en la retejo iĝis pli oportuna. Aldoniĝis kaj aktualigis pli ol triono el ĝiaj nunaj 934 paĝoj. Enhave la retejo nun pli similas al siaspeca reta *Gvidlibro pri la Esperanto-movado*. Ĉi tie estas listoj de landaj kaj fakaj asocioj, kulturaj centroj kaj kursejoj, partoj pri informado, instruado, listoj de retaj grupoj por UEA-membroj...

Alia propra reta servo de UEA estas la retlista forumo *Abonu.com*, kie registrigis intertempe pli ol 530 personoj.

Krom Sveda Esperanto-Federacio kaj UEA ankaŭ diversaj naciaj aŭ regionaj asocioj povas kontentigi pri la vizitokvanto al



siaj retejoj: Inter tiuj Flandra Esperanto-Ligo (Belgio). Ni komencis statistikumi nur meze de 1999. Ni nun havas mezume 700 000 vizitojn jare. Ekde la komenco de la statistikado ni havis 2 000 000 da vizitoj. Ĉar nia retejo ekzistas de 12 jaroj, ni supozas, ke ankaŭ ni certe havis 5 milionojn da vizitantoj, kiel niaj svedaj kolegoj, ĝojas Paul Peerarts, direktoro de FEL.

Tute nova portalo inter la gigantoj jam estas la unua profesia interaktiva kaj daŭre aktualigata novaĵportalo *Gxangalo.com*. La vizitnombro de *Gxangalo*, malgraŭ ĝia mallonga vivperiodo, jam impresas – averaĝe 283 personoj tage en januaro, 452 en februaro kaj 587 en marto. La monata totalo da vizitantoj estas en januaro 6 864, en februaro 11 005 kaj en marto 13 500, fieras *Gxangalo*-ĉefredaktoro Flavio Rebelo. Nia unua celo estas nun atingi 18 000 vizitantojn. La fakto, ke *Gxangalo* estas

tiu de la vortaro; nur en la kvara loko alvenas la esperantlingvaj dosieroj, listigas Alos i Font. Resume, videblas, ke la reto fariĝas pli kaj pli grava informilo, kaj ke niaj retpaĝoj utilas por informi, ĉar ilin konsultas kelkaj centoj da homoj ĉiumonate. Gravas do teni la informojn ĝisdatataj kaj enkonduki pliajn dosierojn por provizi la vizitantojn per la bezonataj informoj.

La hungara *Esperanto.hu* ne apartenas al Hungaria Esperanto-Asocio, sed al la Esperanto-Centro Eventoj en Budapeŝto. Ekde 1999 ĝi estis vizitata iom malpli ol 40 000 fojojn. La retejo de Eventoj, iama Esperanto-novaĵgazeto, nuntempe aperanta pure elektronike, estis vizitata ĉirkaŭ 17 500 fojojn. Pere de la retpaĝoj informoj ĉiumonate 1 ĝis 3 ĵurnalistoj telefone petas pliajn informojn, diras László Szilvási, direktoro de Eventoj, intertempe retmesaĝoj konsistigas ĉ. 70 % de niaj

poŝtaĵoj. Niaj retejoj estas pure Esperanto-ritaj, do la ciferoj signifas veran Esperanto-interesiĝon. Ekzemple la plena kalendaro de Esperanto-aranĝoj havis ĝis nun (ekde 1999) 28 989 vizitojn.

Ne kalkulado de vizitoj, sed interesajn observojn faris Jukka Pietiläinen, prizorganto de la ĉefa finna retejo. Kiam la Kultura Esperanto-Festivalo okazis en 2000 en Finnlando, tio grave influis al populareco de la paĝoj. Dum tiu periodo estis multe pli da vizitoj de eksterlandanoj al la paĝaro ol kutime. Dum 2002 estis meznombro 22-25 vizitantoj tage, kalkulas Pietiläinen. La paĝoj ne

estas aparte popularaj kaj ili estas ĝisdatigataj malofte. Se aperus konstante nova materialo, la paĝo certe allogus pli da vizitantoj.

La etuloj:

Tute aparta fenomenon videblas en Aŭstrio. Momente certe ne estas granda nombro

da vizitantoj, malĝojas Othmar Liebhart, prizorganto de **Esperanto.at**, ĉar tiom longe kiom kunlaboro inter la aŭstriaj asocioj ne eblas, malfacilegas konstruado de bona informpaĝaro. Sed mi esperas, ke tiu ĉi problemo estos solvita. Des pli bedaŭrinde, ĉar sen la hejmpaĝo *Esperanto.at* oni tre verŝajne ne konus multajn gejunulojn. Preskaŭ sen ia reklamo ĉirkaŭ 70 gejunuloj aliĝis al la aŭstra diskutlisto. Liebhart: Do, la interreto estas tre granda eblo por ni en Aŭstrio.

La Sankt-Peterburgaj esperantistoj en Rusio ne tre ofte ŝanĝas la informojn sur sia retpaĝaro, tamen oni vizitas la paĝon ĉirkaŭ 400 fojojn monate. Same malofte frekventata estas la aŭstria retejo. Ĝis aprilo ĉi-jare ni ricevis 4 390 vizitojn. La retpaĝo enhavas informojn pri Esperanto en la oceania regiono kaj agas kiel pordo por aliaj Esperantaj internaĵoj, diras la prizorganto John Gallagher.

La averaĝuloj:

Inter giganto kaj averaĝo troviĝas ruslingva informilo *Novosti* pri Esperanto, movado, lingvaj problemoj kaj diverseco, kaj instruado. Vizitantoj dum la lasta monato estis 1520, ne malferas prizorganto Slavik Ivanov kaj rakontas: Plej oftaj serĉfrazoj, kondukintaj al la paĝaro estis **Esperanto**, **Esperanto Stalin**, **Esperanto mp3**, **lerni Esperanton**, **novaĵoj de/ pri Esperanto**, **pasporta servo**, **lingva politiko en Sovetio**, **Isajev lingvo Esperanto**. Iom pli ol duono de la vizitoj venas de serĉmaŝinoj. La paĝaro aperas ankaŭ kiel libere dissendata ret-revujo, kaj en tiu formo ĝi havas ĉirkaŭ 3 500 abonantojn kaj aperas 1-2-foje dum monato.

La paĝaro de Japana Esperanto-Instituto estas malpli sukcesa laŭ kvanto de vizitoj. Ni registris 85 322 vizitojn de la unua tago de 2000. Kial tiom da diferenco? demandas sin Sibayama Zyuniti.

Pri la graveco de la reto por Esperanto ankaŭ cerbumis la kataluna aktivulo Hektor Alos i Font. Ĉu la interreto vere fariĝis tiel grava kaj esenca? Kontrolinte la statistikojn por la jaro 2002, la rezultoj montris tre atentindaj. La kvanto de la vizitoj po-tage rapide kreskis kaj atingis kulminon ĉefe en la tagoj tuj post la loka kongreso. Eblas kontroli ankaŭ kiuj partoj plej popularas: multe pli vizitataj estas la katalunlingvaj paĝoj; poste



Reprezentanto de tre malgranda retejo estas tiu de Esperanto-Asocio de Nordrejn-Vestfalio, regiona germana organizo. Pro la relative malgranda celgrupo ankaŭ la vizitkanto estas malgranda: iom malpli ol 900 komence de aprilo post pli ol unujara ekzisto.

La fakuloj

Pluraj Esperanto-retejoj celas specifan publikon. *Edukado.net*, instrufaka projekto, tre zorgas pri siaj vizitantoj ekzemple per lotumado de premioj por ĉiu 5-mila aŭ 10-mila vizitanto. Ni ankaŭ dissendas regule cirkulerojn al membroj de nia komunumo, raportas Katalin Kovács, redaktorino de *Edukado.net*, momente ni havas 250 membrojn en la komunumo. Post 15-monata ekzisto *Edukado.net* povas anonci, ke 15 000 (meze pli ol 40 vizitoj tage) estas la nombro de vizitintoj.

Iom malpli interaktiva kaj bunta estas la retejo de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo. Korespondado nun preskaŭ ekskluzive okazas rete.

Multaj reagoj certe venas por la retpaĝoj, opinias Roland Rotsaert, prizorganto de la paĝaro. Alia faka asocio estas la Societo por Interlingvistiko el Berlino, Germanio, kies retpaĝaro (en la germana kaj en la angla) estas direktita al neesperantistoj. Kiel paĝaro por sciencemuloj ĝi ne havas aparte elstaran vizitkanton: iom pli ol 1200 ekde 2002.

La retpaĝaro de la Biblioteko Butler de Esperanto-Asocio en

Britio estas baldaŭ lanĉotaj, sed jam nun la bibliotekisto Geoffrey King asertas, ke la retpaĝoj estos esenca kaj kerna parto de la biblioteka laboro, ĉar nur malmultaj personoj povos persone viziti la bibliotekon. Aperigo de katalogo, elektitaj fotoj kaj aliaj eroj el la kolekto, k.s. ne nur informos pri kaj varbos por la biblioteko, sed ankaŭ estos eta surogato de la biblioteko por tiuj, kiuj ne povas viziti ĝin, opinias King. Jam nun, eĉ sen la retpaĝoj, preskaŭ ĉiuj informetoj venas retpoŝte. Li mem proprakoste administras kaj redaktas la retejon.

Post tiu mallonga ekskurso al la virtuala Esperanto-movado demandindas ĉu la vizitkanto estas entute grava kriterio? Kelkaj voĉoj neas tion: Multe pli gravas kiom aktualaj estas la hejmpaĝoj. Tiu sveda, kiun ankaŭ mi multe vizitis kaj admiris, fakte seniluziigis min, – ĝi ja ne estas aktualigita kaj oni ne respondas al demandoj, mesaĝoj al la redakcio. Same pluraj aliaj... do, tiel nur la vizitnombroj estas altaj, sed ĉi ili utilas, kontentigas?

Replikas Franko Luin, prizorganto de *Esperanto.se*: Nia retejo enhavas bazajn informojn pri Esperanto por svedoj. Tiuj informoj ne estas konstante ĝisdatigitaj, sed ja ekzistas esperant- kaj svedlingva novaĵservoj, kiuj estas konstante ĝisdatigitaj. Mi respondas al nekredbla kvanto da leteroj mem, sed evidente ne al ĉiuj. Multaj estas mendoj de libroj, aligoj al la retkurso, membrigoj, demandoj ... demandoj ... demandoj...

Marko Naoki Lins



Kiel kunlabori bonetose?

Supozeble vi mem spertis kunlaboran problemon en viaj laborejoj, lernejo, organizo aŭ eĉ familio. Evidente, kunlabori en bona etoso ne estas facile.

Ankaŭ en la Esperanto-movado ni ofte spertas malgatajn kunlaborejojn. Do, klaras ke ne sufiĉas ke ni uzas la pacan lingvon por povi bonetose kunlabori. Mi mem multe kverelis kun esperantistoj lastjare kaj per tiu ĉi artikolo mi volas kaj sincere pardonpeti al ĉiuj kiujn mi ofendis aŭ genis, kaj samtempe provi helpi al pli agrablaj kunlaborklimatoj estontece.

Ĉitaĵoj pri kunlaboro

La libro *La Kunlaborstrukturo* estas suplemento al la verkaro de Martinus kaj ĉelas plifaciligi la kunlaboron kiu ekzistas ĉirkaŭ lia kosmologio. Partoj de

tiu libro povus esti helpo ankaŭ por ni esperantistoj, sed ĝi momente ekzistas nur en la dana. Tial mi elprenis kaj tradukis kelkajn citaĵojn kiuj estas aparte aktualaj por ni, kaj aldonis mallongajn komentojn. Tiuj citaĵoj montras principojn kiuj donas kunlaboran bazon kaj dum jardeko funkcias por Martinus-Instituto en Kopenhago kaj Martinus-centroj en Skandinavio.

Prijuĝo de eraroj

Oni ĉiam memoru pri la granda vidmalforteco aŭ blindeco, kiam temas pri ekzamenado aŭ prijuĝo de propraj eraroj, kaj la grandega vidakreco, kiam temas pri eraroj de la proksimumo, kiujn oni deziras substreki.

Ni ĉiuj foje eraras kaj faras fuŝojn, gravas konscii pri tio kaj ne vidi erarojn nur de aliaj.

Iritigo kaj elreviĝo

Oni ne lasu sin iritiĝi aŭ elreviĝi pro konduto de aliaj homoj, same kiel oni ja ankaŭ ne elreviĝas pri tio ke herbaĉo ne estas rozo aŭ lilio.

Ni ĉiuj estas kiaj ni estas. Tion foje malfacilas akcepti, sed indas provi, aparte kiam temas pri kunlaborantoj.

Trovi ĝojon kaj inspiron

Oni ne venu kaj kriplendu. La demando estas, ĉu la homoj povas trovi ion kio povas ĝojigi kaj inspiri ilin. Se tio ne eblas, ili devas foriri.

Anstataŭ esti malkontenta kaj plendema, estas pli bone foriri de la koncerna organizo aŭ kunlaboro, kaj agi en aliaj kadroj. Tiel oni povas kaj resti en amika rilato (almenaŭ ne malamika) kun ĉiuj, kaj samtempe pli bone helpi al la evoluo de la movado kaj de si mem aliloke.

Plej gravas amikeco

Ne tiom gravas ke ni samopiniu pri la analizo, sed gravas ke ni estu amikoj.

Same en nia movado, se ni volas allogi aliajn kaj paroli pri komuna lingvo, kiu kreas amikecon kaj pacon inter nacioj kaj homoj, gravas ke ni mem estu amikoj kaj havu pacan etoson.

Humileco kaj memadmira

Se venas iu kiu montriĝas esti talenta, oni ankaŭ atentu ĉu li fanfaronas pri sia talenteco, kaj ĉu li admiras sin mem kaj volas ke ankaŭ aliaj faru tion. Tiuj kiuj deziras la potencon, estas la malplej taŭgaj.

Se iu tre laŭdas sin mem kaj nepre volas potencon, verŝajne estas pli bone trovi alian pozicion por tiu persono.

Kritiki sin mem

Ni memoru ke ni ne kritiku aliajn. Oni ne kritiku la kunlaborantojn. Oni transiru al memkritiko. Tio estas tre grava punkto.

Iom da kritiko povas foje helpi en kunlaboroj, se ĝi estas konstruiva. Sed se ni povus havi kiel celon ne ĉefe kritiki aliajn sed subteni aliajn kaj pensi pri memkritiko, tio certe helpus eĉ pli.

Aŭskultemo

Ni volonte estu aŭskultemaj. Se iu donas bonajn konsilojn, ni ĝoju pri tio. Nur kun tiuj kiuj volas mem decidi, tiuj kiuj koleriĝas, ni ne diskutu.

Ne indas multe diskuti kun homoj kiuj koleriĝas kaj volas tro decidi, pli gravas havi bonan etoson kaj kunlabori

kun homoj kiuj kongruas kun la strukturoj kaj celoj de la organizo aŭ koncerna agado.

Spertoj pri kunlaboro

Kiel menciite, mi mem plurfoje estis parto de kverelo kaj malbonetosa kunlaboro en la movado. El tiuj spertoj mi espereble iom lernis kaj povos pli bone agi dum similaj situacioj en estontaj kunlaboroj. Dum tiuj, foje sukcesaj, foje problemaj kunlaboroj, mi konstatis (sed ofte mem ne faris), ke por harmonia kunlaboro tre gravas atenti pri:

Amika komunikstilo – Aparte dum reta komunikado estas facile ofendi/ofendiĝi kaj miskompreni. Do, indas apliki tre afablan komunikstilon en kunlaboroj, kiuj okazas per la reto. Ankaŭ dum fizikaj kunsidoj gravas esprimi sin diplomate kaj amike, se oni volas sukcesi pri ekzemple nova propono.

Kolegeca sinteno – Se iu persono aŭ organizo havas pli da potenco ol alia(j) en kunlabora rilato (ekzemple financa aŭ decida), estas granda risko ke aperos malsana laborklimato. En tiuj kazoj helpas se la organizoj/personoj tamen havas reciproke kolegecan sintenon por eviti gepatroj-infano-rilaton, en kiu la pli potenca grupo ne tute serioze traktas sian kunlaboran partneron kaj samtempe la malpli potenca grupo ofte plendas pri sia malbona situacio ne agante mem por plibonigi ĝin.

La "realoj" estas diversaj – La kompreno de "estroj", ekzemple estraranoj, ofte ne tute kongruas kun la realo, kiun spertas la "laboristoj", ekzemple oficistoj. Same la "laboristoj" ne ĉiam bone (konscias pri la "granda bildo" kiun havu la estroj. Gravas ke oni atentu pri tio en kunlaboroj en organizoj kaj ke oni provu kompreni la vidpunkton de la aliaj por tiamaniere trovi solvojn kiuj kongruas kun la veraj bezonoj, kaj ĉiutagaj kaj longperspektivaj.

Sincereco – Tiuj, kiuj ĉiutage laboras pri io, tuj rimarkas kiam la estroj, kiuj ofte ne same bone konas la ĉiutagaĵojn, ne estas sinceraj kaj kaŝas

problemojn en siaj prezentoj/raportoj kaj tio kaŭzas misfidon kaj malkontentecon. Sincera kaj malkaŝa traktado de problemoj helpas al kaj pli bonaj rilatoj, kaj trovado de longdaŭraj solvoj.

Ne tro akre diskuti – Longaj akraj diskutoj malforte donas iun bonan rezulton. Se vi rimarkas ke la plejmulto de la grupo/organizo havas sian imagon kaj ne ŝatas kion vi prezentas aŭ proponas, kaj ke vi sentas koleron kontraŭ ili pro tio, tiam estas pli bone ke vi forlasu la kunlaboron/organizon dum iom da tempo kaj lasu la aliajn en paco, ol ke vi insistu pri via propra starpunkto. Tiel ili havos pli da tempo por fari la veran laboron, vi havos tempon por aliaj kunlaboroj/projektoj kaj evitos kverelon kaj malbonan etoson. Plej ofte amika etoso pli gravas ol konvinki aliajn pri sia vero.

Estus tre interese aŭdi pri spertoj de viaj kunlaboroj kaj viajn konsilojn pri tio, kiel plibonigi etoson kaj kunlaborem en grupoj. Se vi emas, skribu al mi pri tio kaj kion vi pensas pri tiu ĉi artikolo.

Laste mi volas substreki, ke se ni volas esti movado por mondpaco, ni devas mem lerni kunlabori en paco kaj amikeco. Komprenebla afero, tamen ne facile atingebla, sed iom post iom ni espereble sukcesos... Pacon al ni ĉiuj!

Hokan Lundberg
hokan@iikso.net



Desegnis Helen Claesson

Nia anonima movado

Jardar Eggesbø Abrahamsen

La Esperanto-movado havas problemon. Ni provas varbi kaj reklami, sed ni restas pli-malpli nevideblaj en la ekstera mondo. Kio estas la naturo de tiu problemo? Por respondi al tiu demando oni unue konstatu la celon de nia movado.

La oficiala celo

La Esperanto-movado havas celon, kaj tiu celo estas nia produkto, kiun ni ofertas al la mondo. Nia lingvo ekestis kiel rimedo por politike neŭtrala komunikado trans etnajn kaj naciajn limojn. Ni ofertas al la mondo pacon surbaze de kompreno kaj amikeco per politike neŭtrala lingvo. Ni multe parolas kaj reklamias pri tio.

Por atingi la pacan celon la Esperanto-movado varbas esperantistojn, ĉar oni bezonas esperantistojn por entute povi atingi pacon per Esperanto.

En praktiko

Sed kiel ni vere uzas la lingvon? Nu, ni verkas librojn en ĝi, kaj ofte la libroj temas pri la lingvo mem, aŭ pri la movado. Ni havas multajn organizojn, sed ilia celo plej ofte rilatas al la lingvo Esperanto aŭ ties kulturo kaj historio. Aldone estas kunvenoj kaj kongresoj, kie ni okupiĝas pri nia propra komunumo.

Amuzo estas grava, ĉar ni estas homoj. Gravas ankaŭ primovadaĵoj libroj kaj organizoj, ĉar ni estas lingva kaj organiza komunumo. Sed ĉio ĉi signifas ke la ĉefa praktika celo de la Esperanto-movado estas varbi al movado, kies ĉefa praktika celo estas varbado kaj memokupiĝo.

Kaj tamen ni intense atendas ke la ekstera mondo donu al ni la Nobel-premion por paco. Ni ne meritas tian premion. La Nobel-premio postulas praktikan laboron. Ne sufiĉas bonaj ideoj. Anglalingvaj organizoj faras multe pli ol ni por paco kaj justeco.

Ekstrema komparo

La Savarmeo estas religia organizo, kies celo estas servi al la kristana Dio. La Esperanto-movado ne estas religia movado, tamen komparo de kelkaj aspektoj de la du tre malsimilaj movadoj povas esti utila.

Ambaŭ movadoj ja provas konvinki kaj varbi. Sed dum ni esperantistoj kutimas varbi per argumentoj, la Savarmeo fakte praktikis siajn ideojn, solvante problemojn, ekz. per disdonado de supo al malriĉuloj. Pro tio la Savarmeo ĝuas respekton kaj estimon. La Savarmeo, uzante sian internacian reton, helpas eksterulojn trovi malaperintajn personojn. La Esperanto-movado uzas sian internacian reton por mem ekhavi helpon unu de la aliaj, ĉu per Delegita Reto, ĉu per Pasporta Servo.

La Savarmeo ne estas helporganizo, sed helpas, konforme al siaj ideoj. La Esperanto-movado ne estas helporganizo, kaj ankaŭ ne helpas, male al niaj ideoj. Aliflanke ni volonte fanfaronas pri niaj nuraj ideoj, dum la Savarmeo simple inkluzivas sian Dion kiel nestrangajn fundamenton.



Ĉu la movado taŭgas?

Ni havas movadanojn tra la tuta mondo, kaj ni estas relative multaj (ĉ. 20 000 organizitaj membroj). Nia reto estas uzebla multmaniere, kvankam ni ĝis nun uzis ĝin relative sencele aŭ simple por movad-internaj celoj.

Kompreneble ni devas okupiĝi pri la jam varbitaj esperantistoj, ni devas kongresi, amuziĝi, babili kaj ludi. Gravas niaj amaskomunikiloj kaj interretaj renkontejoj. Sed aldone eblas ankaŭ ekplenumi niajn reklamatajn celojn.

Ekzemploj

Bona ekzemplo de tia ekplenumo estas la projekto **Agado Espero**, kiu en 1999 per Esperanto helpis militviktimojn en eksa Jugoslavio, disdonante dumil helpajn pakojn.

Alia bona ekzemplo estas la projekto **Indiĝenaj Dialogoj**, kiu faras praktikan laboron por interkulturaj dialogoj kaj por la rajtoj de indiĝenaj popoloj.

Verŝajne ne ekestas pli bona reklamo por nia movado ol senfanfaronaj ekzemploj ke nia lingvo funkcias, ke niaj reklamoj pri paco kaj justeco estas pli ol senvaloraj ofertoj kaj teoria ideologio.

Esperantistoj multe kongresas. Sed kial niaj kongresoj tiom ofte okupiĝas pri la movado mem? Estas amaso da konfliktoj en la mondo. Per nia lingvo ni ne povas solvi ilin, sed ni almenaŭ povas fari ekzemplojn pri transpolitika kompeniĝo.

Ekzemple oni povas aranĝi tute normalajn renkontiĝojn (malgrandajn kaj neformalajn), kien oni speciale invitu individuojn el specifaj konfliktantaj nacioj aŭ popoloj. Ili diskutu kaj malkonsentu, sed almenaŭ parolu unu kun la aliaj, kaj kune amuziĝu kaj ludu inter la diskutoj, kiel dum ordinarnaj Esperanto-renkontiĝoj.

Eblas do ekdirkti niajn aktivecojn kaj organizojn al la konkretaj problemoj de la ekstera mondo, por fakte kontribui al neŭtrala komunikado kaj interkompreniĝo. Nia agado havu la lingvon kiel rimedon, kaj ne nur kiel celon.

Kaj se ne?

Povas esti ke la skizita praktika laboro ne estas la ĝusta pado por ni. Povas esti ke la Esperanto-movado havu alian celon ol tiun kiun ni teorie havas. Povas esti ke nia celo vere estu nura memokupiĝo. Povas esti ke ni havu ankoraŭ tute alian celon.

Ĉukaze ni devos difini nian celon: Kion ni volas, kion ni praktike faros, kaj kion ni ofertas al la mondo? Ne estas facile vendi produkton, kiu ne estas klare difinita.

Sukcesa parlamenta agado de italoj kontraŭ lingva diskriminacio:

Malegaleco de la gepatra lingvo

Jam de jaroj esperantistoj tre fervore kultivas la parlamentan agadon, dum kiu ili aŭ rekte informas pri Esperanto, aŭ atentigas pri ĝeneralaj lingvaj temoj (ekzemple lingvopolitiko aŭ lingva diskriminacio). Modele agadas ĉi-kampe la Itala Esperanto-Federacio (IEF).

Dum la unuaj monatoj de 2003 IEF koncentris sian parlamentan agadon al la temo de lingva diskriminacio per sendado de retmesaĝoj al ĉiuj italaj deputitoj kaj al ĉiuj partioj reprezentataj en la itala senato. Enorma laboro, ĉar temas pri ĉirkaŭ 600 adresoj.

En kunlaboro kun la Brusela Komunikadcentro ni sugestis al la deputitoj demandi: "Kion faras la ministro pri eksterlandaj aferoj koncerne la lingvan diskriminacion favorantan la denaskajn angloparlantojn en dunganoncoj de Eŭropunaj instancoj kaj en organizaĵoj stipendiataj de Eŭropa Unio?", klarigas Michela Lipari, kiu estras la politikan komisionon de IEF. Ĝis nun 13 deputitoj – el ĉiuj politikaj grupoj – respondis kaj estis interesataj kaj prezentis/os oficialan demandon al la registaro pri la lingva diskriminacio en Eŭropo.

Unu deputito respondis ke temas unuavice pri la malbonega ekonomia situacio de la italaj firmaoj, ĉar se tiuj okupus unuajn rangojn en la mondo, ili postulus ankaŭ bonegan scipovon de la itala lingvo de dungutoj.

Mi estas kontenta pri la rezulto, konsiderante, ke estas la unua tia provo, ĝojas Lipari. Ni jam havis malpli bonajn spertojn: La italaj deputitoj en la Eŭropa Parlamento de jaroj ricevas la italan revuon kaj preskaŭ neniam donis vivosignon! Georges Sossais de la Belga Esperanto-Federacio gratulas la italojn

pro la kampanjo. Oni ne devas iri tro rapide en la afero. Via alproksimiĝo de la problemo estas laŭ mi la plej taŭga, li notas. Iun tagon mi parolis kun verdula ministro. Ŝi diris al mi "Esperanto? Sufiĉas al mi konado de la angla, de la germana kaj de la nederlanda!"

Laŭ Sossais, tio signifas ke oni ne povas esperi je iu rapide atingebla komuna tereno kun ĉiuj politikistoj. Oni devas unue komenci per "Kion vi faras kontraŭ la malegalrajteco de nia gepatra

lingvo? Poste oni venos kun aliaj demandoj.

IEF estonte ne intencas perdi la kontakton kun la deputitoj, kiuj sin montris malfermaj al la fenomeno de lingva diskriminacio: Mi intencas kunigi ilin en aparta adresaro kaj sendi al ili de tempo al tempo interesajn informojn, diras Lipari. Kaj mi tre scivolemas pri la respondo de la registaro.

Konsultu la liston de 500 diskriminaciaj laborposten-ofertoj ĉe: <http://www.lingvo.org/it/2/15>.

Tiuj, kiuj interesiĝas pri similspeca parlamenta agado kontraŭ lingva diskriminacio en sia lando, estas kore bonvenaj kontakti la Bruselan Komunikadcentron:

komunikadcentro@esperanto.org

Marko Naoki Lins

Eŭropa Jaro de Handikapitoj

Malkonstruu ne nur la fizikajn barojn, malkonstruu ankaŭ la lingvajn/kulturajn barojn por la internacia agado de handikapitoj! – Tion emfazas d-ro Renato Corsetti, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, kiu kune kun la prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, d-ro Seán O' Riain kaj Jarmila Rýznarová, prezidantino de Asocio de Esperantistaj Handikapuloj (AEH), verkis deklaron okaze de la Eŭropa Jaro de Handikapuloj.

A EH, kiu ekde 1996 estas faka asocio de UEA, okazigas regule internaciajn kongresojn kaj eldonas propran bulleton.

Li problemaro de personoj kun divers-tipaj handikapoj estas malfacila afero. Certe estus bonege, kaj tio estas nia sincera deziro, helpi al ĉiuj senpovaj homoj sendepende de la speco de handikapo ne nur korpa, sed ankaŭ por la homoj de malbona sociala sekuriĝo kaj

lingvaj obstakloj. Estus ideale, se handikapitaj homoj de la tuta mondo povus akiri egalrajtecon de sia pozicio en la socio pere de la internacia lingvo Esperanto, esperas s-ino Rýznarová kaj asertas: Bonan sukceson al handikapuloj de la tuta mondo eblus atingi nur per unusola komuna internacia lingvo Esperanto.

Pliaj informoj pri la Eŭropa Jaro de Handikapuloj troveblas rete ĉe: <http://www.eypd2003.org/eypd/index.jsp>.

Deklaro okaze de la Eŭropa Jaro de Handikapitaj Personoj

La jaro 2003-a estis deklarita Eŭropa Jaro de Handikapitaj Personoj. La Esperanto-movado tra unu jarcento kreis komunumon, kiu estas tre malferrita al homoj *malsamaj*, al homoj kun socie marĝenaj pozicioj, al homoj kun fizikaj malavantaĝoj. En nia komunumo fakte agas kelkaj asocioj de parolantoj de Esperanto kun malavantaĝoj. La plej ĝenerala estas la Asocio de Esperantistaj Handikapuloj, sed estas aliaj, ekzemple la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj.

La devizo de la Eŭropa Jaro de Handikapitaj Personoj estas *Ciuj en la vagonaron!*, alivorte la eŭropa komisionarino Anna Diamantopoulou volas montri per tiu devizo la malferran sintenon de eŭropaj instancoj al 10% de la eŭropa loĝantaro, kiu suferas pro malavantaĝo fizika de ajna speco. Same la prezidanto de la Eŭropa Federacio de Handikapuloj asertas, lige kun la jaro, ke handikapuloj estas plenrajtaj civitanoj de sia socio, kaj devas esti traktataj kiel tiaj.

La Esperanto-movado ĝenerale batalas por solvi la lingvajn kaj kulturajn malavantaĝojn de homoj, kiuj, ne parolante la fortajn lingvojn, estas konsiderataj duaklasaj civitanoj ofte en sia lando mem. Ni volas ke ankaŭ parolantoj de lingvo de malpli grandaj landoj estu konsiderataj plenrajtaj civitanoj de la Eŭropa Unio kaj de la respektivaj naciaj socioj.

En tiu senco la streboj de la Eŭropa Jaro de Handikapitaj Personoj estas tuj kompreneblaj por parolantoj de la internacia lingvo Esperanto, kiuj deziras ke ĉi tiu jaro estu okazo por efektiva plibonigo de la situacio en ĉi tiu kampo. Samtempe oni invitas la eŭropajn instancojn forigi la lingvajn kaj kulturajn barojn por ĉiuj eŭropanoj kaj oni invitas la handikapitajn personojn lerni Esperanton por iĝi membroj de sendiskriminacia komunumo, en kiu ĉiu estas samvalora homo.

Ni malkonstruu la lingvajn-kulturajn barojn por la internacia agado de handikapitoj!

Eŭropa Esperanto-Unio
Universala Esperanto-Asocio
Asocio de Esperantistaj Handikapuloj



Reago al R. Corsetti „Pri la milito“ en *Esperanto* 4/03:

Gratulon kaj dankon al nia prezidanto!

Kuraĝe li tuŝis gravan tabuon, la kvazaŭ sanktigitan neŭtralecon de UEA! Al tiu aŭdac kaj kuraĝiĝis lin milito, kiu estis longe planita, preparita kaj anoncita antaŭ la vaste malfermitaj okuloj de la tutmonda publiko (male al multaj aliaj militoj) – kaj tamen li sentis necese, certigi al si la moralan subtenon de Zamenhof. Ĉu vere nia Universala Asocio estas tiom timema, ke oni devas pardonpeti por malaplaŭdi tian militon?

Neŭtraleco ja estas grava principo de UEA, kaj ni respektas ĝin. Dum la tempoj de *Malvarma Milito* ĝi ludis vivnecesan rolon por UEA, kiu devis teni sin, same kiel la terglobo, en labila ekvilibro inter du alte armitaj superpotencoj. De tiam la situacio profunde ŝanĝiĝis, la klaraj frontoj forviŝiĝis: El la superpotencoj restis nur unu. Registaroj penas novorientiĝi. Vekiĝis kaj ekparolas la popoloj. Komenciĝis tutmondaj diskutoj inter individuoj kaj grupoj. Ĉu sen Esperanto?

Sed kiel aŭdiĝi nian voĉon, se ni mem silentas? Laŭ nia opinio ni, esperantistoj, devus partopreni en la granda tutmonda diskuto, por ne izoliĝi de la defioj de la nuntempo, fundamente gravaj ankaŭ por la estonto de nia lingvo.

UEA, kiel la plej grava organizaĵo de la Movado, devus akcepti tian defion, ludi adekvatan rolon, kaj per tio subteni la pozicion de Unuiĝintaj Nacioj.

Wera kaj Detlev Blanke

Kiel multobligi la membron de UEA?

Unue: sendube, la plej grava tasko de UEA kaj ĝiaj Landaj kaj Fakaj Asocioj, individuaj kaj aligitaj membroj estas **Disvastigi Esperanton**. Tiu estas la nura eblo longdaŭre fortigi la movadon kaj UEA, kaj multobligi ĝian membraron. Por tio taŭga informado tra amaskomunikiloj je internacia nivelo estas urĝe bezonata. Ju pli da homoj scias ke ekzistas Esperanto, des pli da homoj lernas Esperanton kaj eventuale membriĝas en UEA.

Due: ni devus (ĉiuj LA, FA kaj/aŭ perantoj) esplori kiu estas la esperantistoj, esperantoparolantoj kaj amikoj de Esperanto, kiuj ne membras en UEA, kaj kial. Unu persono devus respondeti kaj kunordigi tiun tutmondan agadon.

Trie: se estas malzorgemo, neinteresiĝo aŭ forgeso, ni (perantoj) kaj CO kunlaboro devas klopodi (re)varbi ilin per bone planataj kaj kunordigitaj rimedoj.

Kvare: se la kialo estas manko de rimedoj, ni devus oferti MG-membrecon (eble pli malmultekoste ol la nuna tarifoj). Se eĉ tio ŝajnas tro por iuj, ni devas organizi kampanjon por trovi inter niaj membroj *zorgantojn* kiuj pretus pagi tiun malaltan kotizon por unu aŭ pliaj nepagipovaj samideanoj (se tio estas praktika, ili devus koni, almenaŭ letere, siajn/zorgantojn). Ĉiu juna aŭ ne tiel juna pagipova esperantisto devus helpi almenaŭ al unu! Ĉu estus tro esperi, ke tiamaniere ni akiru almenaŭ 1000 pliajn membrojn?

Kvine: ĉiam ni fiksis la prezon de kursoj, por komencantoj aŭ progresantoj, ni enkalikulu la membrigon de la lernanto en UEA (la kursigivanto decida en kiu kategorio; se la kursoj estas senpagaj, ni postulu almenaŭ sufiĉan pagon por ebli la membrigon. Tio ne nur helpas al UEA kaj al la LA akiri pliajn membrojn, sed ankaŭ reteni pliajn kursifinantojn en la movado.

Johano Bachrich

Repaciĝo laŭ Zamenhof

Mi gratulas vin pro via ĉefartikolo **Repaciĝo**. Mi neniam komprenis tiun daŭran disputon inter esperantistoj. Zamenhof certe antaŭvidis tion, kiam li volis enkonduki samtempe kun la lingvo sian homaranismon. Bedaŭrinde, en la unua UK de Bulonjo-ĉe-Marŝo li faris la eraron volante enkonduki superreligion, kio estis neakceptebla same por kredantoj kiel por nekredantoj, kaj tiel fuŝis la kern-ideon, kiu estis *bona interrilatado inter ĉiuj esperantistoj*. Poste li transformis sian ideon en specon de *homaranismo* (kvankam tiu vorto estas malbone elektita). Li eĉ konsideris *ĉiujn manierojn interrilatadi* pli grava ol la lingvon mem. La ideo ne estis ĝenerale akceptita.

Tamen estas klare, ke Esperantio bezonas ian komunan skribitan *ĉarton*, per kiu ĉiuj esperantistaj organizoj, kaj sekve ĉiuj esperantistoj, konsentas trakti unu la alian kiel egalulojn, respektante kaj demokratie, kaj kondamnans kaj klopodas ekskludi estontece ĉian formon de malrespekto, ofendoj kaj eĉ sarkasmo. Ĉar eĉ se la diversaj esperantistaj grupoj havas diversajn idologiajn opiniojn, ili laboras por la sama komuna idealo: bona interrilatado kaj interkompreniĝo inter la homoj de ĉiuj popoloj. Tial pli bona simbolo ol la verda stelo por Esperanto estus *fluganta kolombo*, kies du flugiloj simbolicas unu la lingvon kaj la alia la zamenhofan homaranismon. Se unu el ĝiaj flugiloj lamas, ĝi ne kapablas flugi.

Pieter Jan Doumen

Repaciĝo per kunlaboro

Al mi plaĉas via **Repaciĝo**. En la junio mi laboris en laborista brigado. Mi sufiĉe forte “ne satis” unu el la brigadanoj. Foje mi devis labori kun li, sed mankis alia “parulo” krom la “malŝatato”. Dum tuta tago ni do laboregis kune, levante, muntante kaj malmuntante pezajn pecojn, turnante boltojn k.s., helpante unu la alian per la kvar manoj, per la samaj boltiloj, turniloj. Fine de la tago mia malŝato se ne malaperis, tamen multe reduktiĝis. Do, venis io simila al repaciĝo. Repaciĝo venas dum kunlaboro, dum laboro. Ĉu ni, UEA-anoj, ofte kunlaboras? La tasko de niaj gvidantoj estas trovi laboron, laborigi la UEA-anojn, kunigi ilin dum la laboro. Ni trovu kampojn, kampetojn, kie necesas internacie labori, internacie kunlabori.

Jen unu el ili. La plej gravaj taskoj de ĉiu esperantisto estas *Disvastigado*, *Instruado* kaj *Utiligado* de Esperanto. Tiuj temoj devas domini en la reto, listoj, E-gazetaro, E-renkontiĝoj. Oni parolas tie pri io ajn sed ne pri la plej grava direkto de la Movado. La Pasporta Servo estas unu el la utiligoj de la kono de la lingvo. Sed nek UEA, nek TEJO multe atentis PS-on. Mi estas certa, ke preskaŭ la tutan laboron pri PS heroe faras unusola homo, Derk Ederveen. Li meritas subtenon kaj laŭdojn. Oni devas multe paroli pri PS, ne nur inter la esperantistoj. Ekzistas miloj da vojaĝemuloj, kaj iliaj vojaĝoj havas diversajn celojn. Ĉu la mondo scias pri PS? Necese, ke aperu artikoloj, sciigoj pri PS, pri la kondiĉoj de la gastigado en la nacia gazetaro. Aperu raportoj de la vojaĝantoj, aperu raportoj pri la avantaĝoj de E-o. Uzantoj povas famigi nian aferon pli ol ni tion faras per parolado, teoriomado sen praktika uzado de nia lingvo.

Eŭgeno S.P.

Novaj Honoraj Membroj

En la Gotenburga kunsido la Komitato de UEA distingis ses elstarajn esperantistojn per honora membreco de UEA.

Edwin Burg

naskiĝis en 1925 en Indonezio. Post malliberigo en koncentrejo por la Dua Mondmilito (1942-1945) li en 1946 ekloĝis en Nederlando, studis ekonomikon kaj laboris en banko. En 1965 li eklernis Esperanton kaj ekde tiam dediĉis sin al disvastigo de nia lingvo, varbis centojn da novaj esperantistoj, skribis leterojn al aŭtoritatoj kaj ĵurnaloj, mecenatis plurajn E-organizojn. Ekde 1979, post emeritigo, gvidanto de la oficejo de la Internacia Esperanto-Instituto en Hago, ekde 1995 estrarano de IEL. Lia agado estas altnivela kaj profesia, li multloke kreis grandan respekton por la lingvo.



Adolf Burkhardt

naskiĝis en 1929 en Germanio. Esperanton li eklernis en 1947 per korespondanta kurso kaj partopreninte en UK en Haarlem en 1954 li definitive esperantistiĝis. Protestantista pastro, tre aktiva en GEA, precipe pri la biblioteko: la nuna Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen estas sub lia direktorado. Ekde 1961 prezidanto de KEL kaj ĝia motoro. En 1992 li ricevis *Bundesverdienstkreuz* (Federacia Ordeno pro Merito) pro la ekumena laboro per kaj por Esperanto. Li multe tradukis kaj krono de tiu laboro estas *Adoru*, granda kristana kantlibro, eldonita en 2001. Pro tiu verko kaj lia verkaro ĝenerale, li ricevis, kune kun pastroj Eichhom kaj Kronenberger, la Esperanto-kulturpremio de la FAME-fondaĵo.

Imre Ferenczy

naskiĝis en 1932 en Hungario. Li lernis Esperanton en 1950 kaj diplomigis kiel kuracisto en 1957. Kunfondinto de la Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro en 1955; prezidanto de junulara fako de HEA ĝis 1960; gvidanto de medicina fakkomisiono de HEA en 1970-2000; junulara gvidanto de IFEF ĝis 1970; realiganto de laborkontrakto inter TEJO kaj IFEF en 1968 (UK Tarragona). Pro lia instigo ekde 1982 dum IFEF-kongresoj funkcias radioamatora stacio kun speciala voksignalo. En 1970 li iĝis privata sekretario de d-ro Hideo Shinoda; ekde 1985 daŭre prezidanto de IMEK, internacia kongreso por E-medicinistoj. Membro de redaktantaro de MIR, organo de UMEA. Prezidanto de la Monda Yumeiho-Societo, fondita en 2001 en Budapeŝto. Fondinto kaj prezidanto de hungara sekcio de ILERA kaj la hungara sekcio de la Internacia Fervojista Radioamatora Asocio.



Salah Ghanem

naskiĝis en 1933 en Libano. Profesoro, psikologo kaj grafologia jurspetulo ĉe tribunaloj. Esperanton li lernis en 1960; pioniro de la movado en Libano, kies landan asocion li prezidis dum pluraj jaroj. Li eldonis la unuan E-araban lernolibron en 1965 kaj prizorgis E-elsendojn de radio en Libano. Honora membro de la Internacia Societo de Amikeco kaj Bonvolo (1984); prezidanto de alta komitato por festi la centjarigon de Esperanto (1987) kaj membro de la Brazilia Akademio de Belarto (1965).

Josef Kavka

naskiĝis en 1922 en Ĉeĥio. Kiel doktoro pri natursciencoj, kandidato de teknikaj sciencoj kaj petrologio, li laboris multajn jarojn sur Esperanta scienca kampo, verkis plurfakte informajn artikolojn kaj eseojn, ĉefredaktis *Scienca Revuo* (1978-1987) kaj *Geologio Internacia* (1968-1990), kunredaktis *Scienca Revuo* ekde 2000 kaj kunlaboris pri *Posatlato de la mondo* (1971). Multjara funkciulo de ISAE, ĝia ĝenerala sekretario de 1971 ĝis 1980. ISAE kaj ĈEA atribuis al li honoran membrecon por liaj meritoj.



Internacia Kongresa Universitato



Dum la 89-a UK en Pekino okazos la 57-a sesio de IKU, kie rajtas prelegi universitataj profesoroj aŭ personoj kun simila kvalifiko.

Ĉi estas invitataj prezenti siajn prelegoproponojn (prefere per retpoŝta aldonaĵo aŭ papere en kvar kopioj) al la sekretario de la IKU-komisiono:

Prof. d-ro Hans Michael Maitzen
Endemningasse 6-18/1/24,
AT-1230 Wien, Aŭstrio

rete: maitzen@astro.univie.ac.at

kaj unu kopion al la Centra Oficejo de UEA, retpoŝte aŭ papere (kongresoj@cc.o.uoe.org).

La propono enhavu: koncizan resumon de la prelego (ĉ. 200 vortoj) en Esperanto kaj en la angla aŭ franca (laŭ elekto) kaj foton taŭgan por publikigo.

La prelegoj prefere (ne devige) rilatu al la kongresa temo (baldaŭ anoncota). La elektotaj prelegantoj ricevos modestan honoraron, sed ne repagon de la kostoj. Ĉiuj prelegantoj devas esti kongresanoj kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Aparte bonvenaj estas junaj kandidatoj aŭ tiuj kiuj ankoraŭ ne prelegis en IKU.

Limdato por la kandidatiĝo:
la 15-a de januaro 2004.

Antanas Mekys



naskiĝis en 1917 en Litovio, studis ekonomikon, lektoris en la Vilniaus Universitato, poste laboris en Ŝtata Komisiono pri Planado ĝis emeritigo.

Pri Esperanto li ekinteresiĝis en 1933 kaj serioze lernis ĝin en 1955. Ekde 1959 agis kiel instruisto, instruis al miloj da homoj per tradiciaj kaj korespondaj metodoj, verkis diversspecajn lernolibrojn kaj mem publikigis ilin, kontraste al la tiama politika situacio; redaktis kaj aperigis specialajn kursojn, kiuj iĝis bazo por organizita movado en tuta Litovio. En 2001 aperis lia plej grava lernolibro por litovoj kun dudirekta vortaro. Li esploris la historion de E-movado en Litovio, kompilis biografiojn de 200 famaj litovaj esperantistoj. Okaze de lia 80-jariĝo la Respublika Kulturpalaco sendis al li dankleteron por lia multjara kaj sindona laboro por Esperanto.

NAVIGE

Tra TTT-paĝoj

Ĵen pluraj
verdaĵ gutoj
ol la informocano
de Tut-Tera Tekso.
Seĝu la redakcion pri plij
konsultindaj paĝoj Esperantoj!



ARTO, MUZIKO:

Vera Holodnaja en Esperanto: <http://abonu.com/archive/kulturo.mozaiko/200308/25205330.html>. Rakonto pri la vivo de la unua rusa kin-stelulino. Abonu la retliston Art-mozaiko ĉe Abonu.com kun rakontoj pri la sorto de famaj artistoj.

Diskutgrupo pri E-subtitoligo de filmoj: subtitoloj@yahoo.com. Aliĝu sendante malplanan mesaĝon al: subtitoloj-subscribe@yahoo.com.

E-lingvaj tekstoj de kantoj kaj muziko troviĝas ĉe: www.geocities.com/cigneto/thcind/kristnasko.html.

Nova KD: Elektronika Kompilo – 70 minutoj da aktuala elektronika E-muziko de 10 artistoj el 8 landoj. Mendilo (kaj pluraj muzik-elitiraĵoj): <http://www.vinilkosmo.com>.

Kajto: elŝuteblas du kantoj de la grupo Dormu Milde kaj Masko en la retpaĝaro de Kultura Kooperativo de Esperantistoj: www.kke.org.br. Post la elekto de la E-versio, klaku sur Muzikaro.

BIBLIOTEKO:

Reta Muzeo de Biblioteko Hector Hodler de UEA aperas ĉe: http://www.uea.org/dokumentoj/bhh/tra_la_jaroj.html. Historiaj dokumentoj, bildoj ktp tra la jaroj, kun komentoj.

FAKOJ, APLIKOJ:

TAKE, Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj: <http://take-esperanto.org>. Informoj pri la asocio, pri Esperanto, pri La Domo, la revuo de TAKE, varoj de TAKE (flagoj, labor-gantoj), terminologiaj aferoj.

Astronomio: Astronomia Esperanto-Klubo jam de pluraj jaroj okupiĝas pri interreta Astronomia Esperanto-Terminaro, kiu aperas rete en 92 lingvoj: <http://www.esperanto.org/AEK/AT>.

Cosmos: TTT-paĝoj de la ĉiujara tutlanda astronomia festivala semajnfino en dulingva (angla-Esperanta) versio: <http://www.iolie/-seanmck/tas.htm>.

Laboristoj: La TTT-ejo de Internacia Laborista Movado havas E-version: www.labourstart.org.

Mozilo: Programo ebliganta la uzon de la retfoliumilo Mozilla en Esperanto: <http://www.esperanto.org/uy/mozilo/>.

Budhana Ligo Esperantista inaŭguris sian novan retejon: <http://esperanto.us/budhana.html>.

Opero: La retfoliumilo Opera ekde la versio 6.00 ĝuste traktas la unikodajn karakterojn. La senpaga programo kun E-vizaĝo (traduko de ĉiuj menu-tekstoj) haveblas ĉe Federico Zenith: <http://www.stud.ntnu.no/~zenith/indexesp.html>.

Sunenergio: Trilingva (E-a, franca, hispana) retpaĝaro pri kuirado per la sunenergio: www.boliviaini.org.

Ludoj: Mihael Povorin ofertas 37 diversajn Esperantajn ludojn. Vi povas trovi ilin ĉe: <http://mpovorin.narod.ru/ludoj/ludoj.html>.

HUMANISMO:

SPES: E-traduko de la TTT-ejo de humana asocio Soutien Pour l'Enfance en Souffrance – Subteno Por la Infanetaro Suferanta, pri helpo al orfaĵ infanetoj en Togolando. Ĉe la hejmapaĝo de la asocio <http://spesworld.free.fr/> vi trovos ligilon al la E-versio.

La Ligo Humanitas funkciligis novan retpaĝaron ĉe: www.adhumanitatem.com (info@adhumanitatem.com 3).

INSTRUADO, LERNEJOJ:

Lingvokursoj troviĝas ĉe: <http://www.mia-serio.de/index.htm>.

Esperantaj lerniloj, interalie la fama romaneto Gerda malaperis: <http://www.esperanto.org.br/eki/tekstoj>.

Esperanto lernejoj: dulingva komuniko pri la centjarigo de la unua aplikado de E-o en internacia lerneja korespondado: <http://www.esperanto-sat.info>.

Reta E-kurso: Portugallingva versio de la E-Kurso de d-ro Marcelo Casarelli: <http://www.institutoesperanto.com.ar>.

Senpagaj lernejoj pri la rusa kaj la pola pere de E-o haveblas retpoŝte ĉe Massimo Ripani, rete: Xenoitaly@hotmail.com.

Paĝaro pri E-o por rusoj Mir Esperanto: <http://miresperanto.narod.ru>. Angla versio: <http://miresperanto.narod.ru/en.htm>.

JUNULARO:

La ĉi-jara IJK en Lesjöfors (Svedio): <http://www.tejo.org/ijk/> – statistiko pri la kongreso kaj ligoj al fotopaĝoj.

Aktivaj en TEJO: Retlisto de TEJO por faciligi serĉadon de taskoj, projektoj kaj helpantoj. Por aliĝi sendu malplanan mesaĝon al aktivaj-en-tejo-subscribe@yahoo.com. Eblas sendi proponojn al taskoj tejo.org aŭ viziti la paĝon www.tejo.org/aktivuloj/listego.jsp por akiri pli da informoj.

Junularo Esperantista Svislanda informas en la propra retejo: <http://www.jesperanto.ch>.

Skoltoj: Retpaĝoj kiuj interesos infanojn kaj gejunulojn: <http://ttt.esperanto.org/skola/sm.html>. Ret-bultenoj de Skolta E-Ligo.

La novaĵletero TEJO-aktuale legeblas kaj aboneblas ankaŭ per la servo ĉe Abonu.com: <http://abonu.com>.

Reta Informad-Centro: TEJO instalas retejon pri informado (informiloj por elŝuti, oftaj demandoj pri E-o, forumo...): <http://www.ikso.net/ric/>.

La lingvo de skrablo

Ekde 1948 la usona arkitekto Alfred M. Butts merkatumis skrablon, vortludon bazitan po duono sur ŝanco kaj povo. Jam pli ol 100 milionoj da skrablulodoj, en 29 diversaj lingvoj, estis venditaj en 121 landoj de la mondo. Sed kiun lingvon uzi en la mondkonkursoj, ĉu nur la anglan? Aŭ ĉu Esperanto estas la solvo?

Usona esperantisto Clayton Smith multe cerbumis pri la lingva problemo de internacia skrablulodo kaj nun proponas solvon. Per programo en la interreto (<http://skrablo.ikso.net>) oni ludas vere internaciajn skrablokonkursojn per nia neŭtrala kaj tutmonda lingvo.

Smith: Mi mem ekhavis la ideon antaŭ proksimume du jaroj. Mi ekprogramis kaj lanĉis la unuan version de la skrablulodejo la 1-an de marto 2002. Mi programis ĝin dum ĉirkaŭ ok monatoj en mia libera tempo.

Post pli ol unu jaro da ekzisto enskribiĝis ĉirkaŭ 600 ludantoj. La interretan skrablulodejon oni vizitis 5800-foje.

Estas homoj, kiuj vizitas la paĝon ĉiutage, sed foje neniu ĉeestas, agnoskas Smith. Mi nun preparas artefaritan inteligenton por ke oni povu ludi kontraŭ la komputilo kiam mankas aliaj ludantoj. Tio plej verŝajne aperos baldaŭ.

Dafydd ap Fergus



Varsovia Vento: la 4-an de septembro ŝanĝiĝis la adreso de la klubo ttt-paĝo: <http://republika.pl/viavento> (Nia Kroniko, Granda Klubludo, Priskribo de Ago-Semajno ktp).

E-junularo de Novosibirsk: <http://www.nekmovado boom.ru/ESP/index.asp.html>. E-junularo de Volgograd: <http://stelaro.by.ru/index.asp.html>.

KONGRESOJ, RENKONTIĜOJ:

UK '2004: El Popola Ĉinio malfermis retpaĝaron pri la 89-a Universala Kongreso, kiu okazos venontjare en Pekino: <http://www.espero.com.cn/uk2004/e02-2.htm>.

6-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Bilbao, Hispanio, 25-29 aŭg 2004: <http://www.geocities.com/esperantobilbao/>.

Medicinistoj: Informoj pri la konferenco de medicinistoj troveblas ĉe: <http://www.esperanto.ro/imek.html>.

KURSEJOJ:

Interlingvistika Studoj ĉe la universitato de Poznań (Pollando) havas novan retejon: <http://main.amu.edu.pl/-inter/index.html>.

Kastelo Grezjono, Francio: diversgradaj staĝoj, Informoj ĉe: <http://grezjono.kastelo.free.fr>; grezjono.kastelo@free.fr.

E-kurso en Svislando. Informoj troviĝas ĉe: www.grande-course.ch.

LANDOJ, REGIONOJ:

Amerika Komisiono de UEA: www.ameriko.org (informoj kaj dokumentoj, novaĵoj pri la amerika E-movado, diversaj projektoj de AK: Nesto, Kore, Biblioteko kaj Literaturo).

136 E-lingvaj urboinformiloj el 31 landoj legeblas ĉe: <http://www.aliaflanko.de/urbo/>. La retejo www.aliaflanko.de krome ebligas sendi senkostajn bildkartojn al viaj amikoj kaj ofertas serĉojn, kalendaron, enigmojn kaj fotojn.

Irlando: EAI (Esperanto-Asocio de Irlando) nun havas du hejmapaĝojn kun multaj temoj kaj ligoj: www.esperanto.ie kaj www.iolie/-carsfrn.

KAEM: La Komisiono pri Azia E-Movado de UEA en decembro 2002 modifis sian TTT-ejon: http://www2s.biglobe.ne.jp/~jei/kaem/kaem_kap.htm.

Norda Koreio uzas Esperanton: <http://www.korea-dpr.com/~esperanto>. Temas pri pago de "Asocio por Amikeco kun Koreio".

Kroata Esperanto-Ligo havas novan retejon: <http://free-zg.hinet.hr/esperanto/>. Kompilis: Stano Marček


VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabato la 29-a de novembro 2003 (10h00-17h00)



Ph. Chavignon:
Mondvojaĝo
tra Panjo-
Naturo; aŭ
20 jaroj tra
Esperantio



T. Chmielik:
Pri du E-
pioniroj:
Edmond Privat
kaj Hector
Hodler

• 10%-a rabato en la libroservo • ekspozicio de valoraj el la historio de Esperanto • senpagaj kafo kaj teo

KOTIZTABELO DE UEA POR 2004

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	14	36	89	53	32	178
Aŭstrio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Belgio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Brazilo/eŭro	4	10	25	15	9	50
Britio/pundo	5	13	32	20	12	64
Bulgario/eŭro	4	10	25	15	9	50
Ĉeĥio/krono	175	440	1100	660	395	2200
Danio/krono	60	150	370	235	140	740
Finnlando/eŭro	8	20	50	32	19	100
Francio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Germanio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Greklando/eŭro	8	20	50	32	19	100
Hispanio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Hungario/orinto	1300	3200	8000	4800	2900	16000
Irlando/eŭro	8	20	50	32	19	100
Islando/eŭro	8	20	50	30	18	100
Israelo/eŭro	6	16	40	24	14	80
Italio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Japanio/eno	1000	2400	6000	3600	2200	12000
Kanado/dolaro	12	30	75	45	27	150
Nederlando/eŭro	8	20	50	32	19	100
Norvegio/krono	65	165	415	250	150	830
Nov-Zelando/dolaro	17	44	109	65	39	218
Pollando/eŭro	4	10	25	15	9	50
Portugalia/eŭro	8	20	50	32	19	100
Rusio/eŭro	4	10	25	15	9	50
Slovakio/krono	200	500	1250	750	450	2500
Svedio/krono	80	190	480	310	185	960
Svislando/franko	12	31	78	47	28	156
Usono/dolaro	8	20	50	30	18	100
TARIFA A/eŭro	5	13	33	20	12	66
TARIFA B/eŭro	4	10	25	15	9	50

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio, San-Marino laŭ Italio, Liĥtenŝtejno laŭ Svislando.

TARIFA A: Honkongo, Korea Resp., Malto, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFA B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MG: Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T): Membro kun Jarlibro (kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago)

MA(-T): Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto

DM(-T): Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA

MA: ricevas la Jarlibron, la revuon Esperanto, kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon Kontakto

DMJ(-T): Dumviva Membro kun Jarlibro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MJ; ricevas la Jarlibron kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon Kontakto

SA: Simpla abono al la revuo Esperanto, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo Kontakto, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon Kontakto kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

Koran dankon

ke vi ne forgesis pagi
vian UEA-kotizon
por la jaro 2004!

Kiu pagas plej frue, membras plej ĝue!





Interlingvistika festmanĝaĵo

Studoj pri interlingvistiko/Studien zur Interlinguistik. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke. Red. Sabine Fiedler kaj Liu Haitao. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2001. 736 p. ISBN 80 85853 53 v1. 21 cm. Kun resumo en la angla kaj germana/Esperanto. Studoj de 43 aŭtoroj el div. kampoj de interlingvistiko. Prezo: € 27,00.

Ĉiuj, kiuj scias ion pri interlingvistiko aŭ esperantologio, scias, kiuj estas Detlev Blanke. Granda parto de tiuj personoj troviĝas en la *Tabula gratulatoria de Studoj pri Interlingvistiko*. Bedaŭrinde oni devas scii iom da Latino por kompreni, ke *tabula gratulatoria* estas listo de gratulantoj.

En tiu ĉi okazo la gratulato estas kompreneble Detlev Blanke (kaj mi povas – iom malfrue – aliĝi al la gratulado), kaj la libro estas festlibro por li okaze de lia sesdekjariĝo.

Min iom amuzis la uzo de tiu Latinajo, sed la elekton de Latino por tiu sola frazeto verŝajne kaŭzis la fakto, ke la libro cetere estas kaj en Esperanto, kaj en la germana.

Povas esti, ke la plej bona maniero neŭtrale interlingvi inter Esperanto kaj la germana, estas per Latino. Eble pri tio oni povus iam verki esoon interlingvistikan. Mi ne scias, ĉu tiu eseo povus konkurenci kun la vasta gamo de interesaĵoj, kiuj formas la enhavon de la nun recenzata festlibro. Versajne ne, ĉar la kvalito de tiuj artikoloj estas vere tre alta, kaj la panoramo de temoj, kiujn ili kovras, estas tre vasta.

La listo de nomoj de kontribuintoj estas preskaŭ same impona kiel la listo de gratulantoj, kaj inter ili estas aro da nomoj, kiuj garantias ĝuigan festmanĝaĵon al ĉiu, kiu volonte sin nutras per la kvar ĝeneralaĵoj *Lingvoplanado kaj lingvopolitiko, Teoriaj, historiaj kaj aplikaj aspektoj de interlingvistiko, Esperantologio kaj Terminologia-sciencoj kaj leksikografaj aspektoj*. Ĉiuj tiuj temoj kompreneble rilatas ĝuste al la fakoj, pri kiuj laboris kaj plu laboras Blanke mem.

Partoprenis en la surtabligado de delikataĵoj aŭtoroj el 19 nacioj, kaj ili prezentas al ni sume 43 artikolojn. Proksimume du trionoj estas en Esperanto, kaj la tria triono estas en la Germana. Ĉiun artikolon akompanas resumo Esperanta aŭ germana, kaj ankaŭ resumo angla. La emfazo estas je la temoj esperantologio kaj interlingvistiko, kiuj kune kovras ĉirkaŭ 530 paĝojn de la 736-paĝa volumo. Inter la traktitaj lingvoj estas tamen pli ol Esperanto: ekz. Volapuko, Ido, Okcidentalo, Zilengo, la rumana, la greka, la sveda k.a.

Menci ĉiujn artikolojn mi ja ne povas, kaj mi elektas jen iom hazarde el tiuj artikoloj, kiuj plej tiklis mian propran interesiĝon: **Bociort** donas interesajn ekzemplojn de (provoj pri) lingva planado de la rumana lingvo. **Corsetti** diskutas la temon *Lingvaj homaj rajtoj*. **Kuznecov** konatigas nin kun provoj (beletraĵ kaj nebeletraĵ) krei ne nur internacian, sed eĉ universan, t. e. kosman, lingvon (elstaras tie la lingvo AO kreita en 1919 en Rusio). **Schubert** parolas pri t.n. reguligitaj

lingvoj, t. e. striktigitaj subaroj de ordinara lingvoj, intencitaj ne por ĝenerala uzo, sed por certaj difinitaj okazoj, en kiuj estas bezonata plia reguleco kaj ordo. **Fettes** kuraĝe kaj kritike traanalizas la faman Zamenhofan eseon *Esenco kaj Estonteco*. **Becker** donas tre detalan panoramon de Interlingvistiko en la interreto. **Smidéliusz** raportas pri universitata eksperimento, en kiu la studentoj mem skizis kaj eĉ detale ellaboris proprajn lingvoprojektojn por levi sian konscion pri lingvaj strukturoj. **Tonkin** lerte prezentas esperantologion, historio, kun ties du flankoj deekstera (eksogena) kaj deinterna (endogena), t. e. studado de Esperanto fare de lingvistoj-ne-esperantistoj, kaj fare de Esperantistoj mem. Li esperige konkludas, ke ne plu validas la ofta aserto, ke la lingvoscienco ignoras Esperanton.

Vitali majstre diskutas detalojn pri *Nazaj konsonantoj en Esperanto*, kun multaj konkludoj gravaj ne nur teorie, sed ankaŭ praktike. **Dominte** kaj **Haszpra** en po unu eseo studas respektive *Fonemstatistikon kaj Literoftecon en Esperanto*, kaj oni povas kun interese kompari iliajn respektivajn statistikojn. **Back** serĉas *Spurojn kaj influojn de Esperanto en Okcidentalo*, la fama planlingvo de **de Wahl**, kaj trovas tie neatendite multe da ili. **Künzli** kaj **Wacha** prezentas en du artikoloj la fascinan *Vivhistorian kaj agadon de René de Saussure*, kiu estis ne nur unu el la plej gravaj esperantologoj siatempe, sed ankaŭ unu el la plej gravaj, kaj certe la plej produktema kaj verŝajne la plej lerta kreinto de reformprojektoj Esperantaj.

Fellman pristudas delikatajn problemojn pri vortoj por grandaj nombroj en Esperanto (ekz. vortoj kiel *biliono* kaj *miliardo*). Felice intertempe La Nova PIV solvis kelkajn el tiuj problemoj. – Mi povus daŭrigi, sed tiuj specimenoj sufiĉu.

Da kritiko negativa mi ne povas elfosi multon menciindan (krom ke mi volus, ke la artikoloj estu multe pli longaj – ĉar la temoj min tiom interesas). Tamen min surprizigis, kiam meze de cetera tre afereca kaj eĉ seka pritrakto de tutmondigo kaj Eŭropa instruado de fremdaj lingvoj, mi trovis alineon (ŝajne tute seriozan), en kiu la verkinto subite komencis paroli pri telepatia komunikado kun eksterteranoj, dirante ke telepatian kapablon la homoj havis iam ĝenerale, kaj ke ĝin plu havas la praloĝantoj de Aŭstralio. Nu, tiu ŝoka deflankigo (nur unuolinea) vere estas tute escepta en tiu ĉi libro, kiuj cetera estas ĉie strikte scienca kaj racia. Escepto pravas regulon, kiel oni diras. **Bertilo Wennergren**

Kvardekpaĝa broŝuro *Interlingvistiko kaj esperantologio: vojoj al la faka literaturo* estis publikigita de UEA en julio 2003. La aŭtoro estas d-ro Detlev Blanke (Germanio), kiu klopodis doni utilajn voj-indikojn por interlingvistika esploristo.

Esperanto-dokumento pri interlingvistiko

La dokumento priskribas kaj karakterizas atentindajn esperantologiajn materialojn kaj indikas, kie ili estas troveblaj. Kiel kutime la nova Esperanto-Dokumento estas mendebla ĉe UEA kaj abonebla ĉe la landaj kotizperantoj. (GaKo)

Du steloj por la paco

Realigas la mondan pacon la Bahaa kredo kaj Esperanto. Aŭtoro: Paul Joseph Desailly. Melbourne, la aŭtoro, 2002. 146 p. 30 cm. Ilus. Prezo: € 9,60.

APERINTA en Persio ĉirkaŭ la mezo de la 19-a jarcento sub la inspiro de Mirzā Husajn Alī Nūrī (1817-1892), titolita *Bahā'u'llāh* (La Gloro de Dio), la Bahaa Kredo estas sendependa monoteisma religio senhierarkia, senrita kaj sendoma. Nuntempe ĝia internacia komunumo konsistas el ĉirkaŭ 5 milionoj da homoj, kiuj reprezentas la plej diversajn landojn kaj kulturojn.

En la centro de la Bahaa Kredo troviĝas la konvinko, ke la homaro konsistigas unu solan rason, kiu neeviteble marŝos al la formiĝo de unueca mondsocio regota de la principoj de amo kaj justeco. Ĝi subtenas i.a. ankaŭ la principon de egaleco de rajtoj inter viroj kaj virinoj, defendas monogamion, instigas la edukadon de la popoloj, kondamnas superstiĉojn, proklamas la akordon inter scienco kaj religio, instigas la kreon aŭ elekton de internacia helplingvo kaj emfazas pledas por la monda paco. Ne mirigas do la fakto, ke inter bahanoj troviĝas multaj esperantistoj kaj ke obskurantismaj kaj subpremaj fortoj en Irano havis sekretan planon iam ekstermi tiun religion (kaj multaj bahanoj fakte pereis sub la persekutaj batoj de tiu teokratio).

La verko de la aŭstralia esperantisto Paul Desailly, mem bahano, kunigas pecojn de la ĉefaj Bahaaĵ skriboj pri la ideo de internacia helplingvo kaj monda paco kaj kelkajn zamenhofajn pensojn tiurilatajn. Ambaŭ – kaj Zamenhof kaj la Bahaa Kredo – kondiĉigas la starigon de monda paco je larĝa uzado de internacia lingvo, kion bone montras la verko. Tiel, la aŭtoro trovas paralelon inter sia religio kaj la zamenhofa pensado, ofte aldonante proprajn komentojn kaj interpretojn. Tio donas tre subjektivan koloron al la libro, sed iom pli da rigoro estas dezirinda en ĝi. Tiusece, eble povos surprizi pli bone informitan leganton la aserto (p. 50), ke la simpligo de la angla al 850 bazaj vortoj (*Basic English*) estis modere efika sed malpopulara probable pro sia tredo. Foje ĝenas la legadon ne nur tiuj impresionismaj eldirdoj, sed ankaŭ la malgata stilo kaj manpleno da gramatikaj eraroj, kiujn oni povus elsarki per pli atenta lingva revizio.

Kompreneble, Paul Desailly tuŝas ankaŭ aliajn temojn, kiuj rekte koncernas la Bahaan kredon. Ekzemple, ĝiajn klopodojn por socia evoluo. En malgranda subĉapitro li mencias la tre pozitivan fakton ke la Bahaa komunumo ne malatentas la problemojn de la mondo. Laŭ la aŭtoro, ĝi aktivis sur pluraj

kampoj (mediprotektado, virinaj rajtoj, monda paco, edukado, homaj rajtoj ktp), kunlaborante kun pluraj neregistaraĵ organizacioj. Rigardante Unuiĝintajn Naciojn kiel gravan ilon por la homara unuecigo, bahanoj apogas ĝiajn aktivaĵojn per ĉiuj rimedoj.

En la interesa dokumento *Turnopunkto por ĉiuj nacioj: deklaro de Bahaa Internacia Komunumo okaze de la 50-a datreveno de Unuiĝintaj Nacioj*, parte reproduktita en la libro, enestas signoj de la klara lingva konscio de bahanoj. Ilia koncepto pri la solvo de la monda lingvoproblemo tamen iom malsimilas al tiu de la Esperanta komunumo: dum esperantistoj principe rifuzas la nomumon de etna lingvo kiel internacia, bahanoj ĝin akceptas kiel eblan kaj dezirindan. Ambaŭ movadoj, tamen, ne celas la forigon de naciaj lingvoj kaj kulturoj. Tute male, bahaismo estas por la principo *unueco en diverseco*, ne nur en lingvaj aferoj.

Por plu montri al la legantoj kelkajn paralelojn inter la Bahaa kredo kaj homaranismo, la aŭtoro rapide prezentas ĉi-lastan, akcentante la principojn komunajn al ambaŭ. Li ankaŭ revuas kelkajn lerojn kaj paroladojn de Zamenhof kaj kelkajn aliajn de la kolonoj de la Bahaa kredo, Abbās Effendi (1844-1921), konata kiel Abdŭl-Bahā (La Servanto de Bahā, filo de Bahā'u'llāh) kaj Shoghī Effendi Rabbanā (1897-1957, nepo de Abdŭl-Bahā). El tiu materialo evidentiĝas la kredo je la potencialo de internacia helplingvo kiel faktoro akcelanta pacon. Krome, per ĝi eblas al la leganto konatiĝi kun la kelkfoje iom nebula pozicio de Abdŭl-Bahā rilate al Esperanto. En la fino de la libro troviĝas bahaaĵ preĝoj kaj bildo kun resumo de la Esperanta gramatiko (angle).

Oni povas bedaŭri, ke la verko de Paul Desailly estas tro asketisma, broŝurita, kun nealloga grafika aspekto kaj malbonkvalitaj fotoreproduktaĵoj. Tamen, se juĝi laŭ la nobleco de la enhavo, la libro meritas atenton de ni, homoj vivantaj en mondo, kiu tiom multe bezonas pacon.

Reinaldo Marcelo Ferreira

Esperanta najtingalo kantas

Ramona van Dalsem kantas 23 elektitajn kantojn. Kompakta disko. Eldonis: Kopenhago: www.kehlet.com, 2001.69 min. Prezo: € 9,90. Rabato de 3 ekz.

Por ĝelemanoj de Esperanto, ĉi tiu disko de muziko, kiun la *Esperanta Najtingalo* kantas, estas havenda. La vortoj estas tre klaraj kaj libreto venas kune kun la disko, do oni povas sekvi la tekstojn dum Ramona kantas.

Sia voĉo estas freŝa kaj la vortoj de la kantoj (ŝi komponis kaj la muzikon kaj la tekstojn) signifoplenaj. Kelkaj estas amkantoj; aliaj bedaŭras la malbonan agadon de la homoj; ekzemple, n-ro. 7: *La mondo ne estas florgardeno, kaj ne iras la homaro en konstrua kunbatal'*, detruigas propracele Zamenhofa ideo! La etoso tamen estas optimista, ekz. n-ro 9: *Morgaŭ, tio pasas for! Ĉio iros bone, ho,*

multe pli bone ol nun. Kelkaj kantoj povas instrui ion, ekzemple n-ro 20 estas alloga kanto pri paco.

Melodie, la kantoj estas simplaj, sed iom odoras laŭ la pasinteco; hodiaŭaj junuloj eble ne estus allogataj al ili. Ĉiuj estas en majora tonalo (kiu, laŭ mi, faras ilin iom tedaj), krom n-ro 14: *Aŭtuna* (minora) kaj n-ro 6: *La Korŝtelistino*, kiu alternas inter majora kaj minora, iom folklore. N-ro 13 estas interesa ĉa kanto. La akompano plejparte estas plaĉa kaj taŭga.

Fine – bona memora disko de iu, kiu certe donis multe da plezuro al samideanoj dum sia vivo. Máire McKay, Irlando



Belaspekta kaj utila scienca eldonajo el Ĉeĥio

Fakaj studoj en Esperanto. Red. Zdeněk Pluhař. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2003. 146p.
ISBN 80 85853 63 9. 20cm. Resumoj en la angla, germana kaj ĉeĥa. Pli ol 20 eseoj. Prezo: € 16,50.

Tiu ĉi dua volumo de la serio *Aplikoj de Esperanto en Scienca kaj Tekniko* de la eldonejo KAVA-PECH entenas kolekton de kontribuajtoj prezentitaj dum la Kolokvo *Aplikoj de Esperanto en Scienca kaj Tekniko* (KAEST), okazinta pasintjare en Prago, de la 10-a ĝis la 12-a de novembro 2002, organizita fare de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, en kunlaboro kun la Kongresa kaj Kleriga Entrepreno KAVA-PECH, sub aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio. La kolokvo apartenas al serio de samtemaj arandoj distribuataj en du jardekoj.

La verko organizigas en tri partoj. La unua estas dediĉita al ekonomio en la tria jarmilo (7 prelegoj), el kiuj la lasta, *La nomoj kaj simboloj de diversaj valutoj* de s-ro Jiří Patera, povus esti konsiderata kiel apartenanta al la sekva sekcio; la dua, al terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto (10 prelegoj); kaj la tria, al aplikoj de Esperanto en scienca kaj teknika (4 prelegoj).

Kiel ofte okazas en nia komunumo, rilate al specialeca uzado de Esperanto, la pezo de la terminologia sekcio estas pli granda ol tiu de la aliaj, kio nur reflektas la faktan ke ni ankoraŭ estas en la etapo de nomado de la realo kaj, bedaŭrinde, ne de originala produktado de konoj en nia lingvo (pri kio, kompreneble, ni ne diskutos tie ĉi).

Tamen ja estas apliko de la Internacia Lingvo en sciencoj kaj teknikoj; kaj tio estas demonstrata per la diverskvalitaj kunlaboroj konsistigantaj tiun ĉi verkon. La uzata lingvo ne estas senripoĉa, sed pro la allogeco de pluraj temoj kaj ilia



trafa traktado, la leganto estas baldaŭ kaptita en la enhavo. Indus detale prezenti ĉi tie plejparton de la prelegoj, sed ni lasas tiun laboron al la leganto, al kiu ni nur mencias ke, inter aliaj, estas kontribuajtoj pri Adam Smith (de s-ro Bo Sandelin), projektoj financataj de Eŭropa Unio (de s-ro Alain Fagot kaj Gérard Claes), ekonomikaj aspektoj de la solvo de la cigana problemaro (s-ino Eva Poláková), la lingvo-nomo de Esperanto kiel metaforo (de s-ro Detlev Blanke) kaj pri duonaŭtomata tekstotradukado (de s-ro Josef Vojáček).

Por la uzantoj de ne-Fundamentaj alfabetigoj (ekzemple, en interreto) estas aparte interesa la kunlaboraĵo de s-ro Ottó Haszpra, *Alternativaj alfabetoj por Esperanto kun historia trarigardo 1888-2000*, kiu klarigas la estigon de alternativaj por diakritaj E-literoj, kies korekta skribado estis problemo dum longa tempo, kaj prezentas ĝiajn ĉefajn karakterizojn kaj kritike rigardas du proponojn.

Ĉiuj prelegoj estas esperantlingvaj kun resumoj en la angla, la germana kaj la ĉeĥa, kaj, kelkfoje, mallonga akademia prezento pri ĉiu aŭtoro en la sama lingvo de la kunlaboraĵo; do, homoj, kiuj ne regas Esperanton, povas iom kompreni la enhavon de tiu ĉi verko, kiu fizike kaj materiale estas belaspekta.

Esperable tiaj ĉi arandoj daŭre okazos kaj la prelegoj estos publikigitaj, tiel ke la Esperanta komunumo povos kaj informiĝi pri la diskutoj kaj apogi la sciencon eldonadon en Esperanto.

Jorge Antonio Leoni de León

Reage al la aperigita recenzo pri la libro de Marc Bavant *Les Bases de l'espéranto d'après le fondamento* (julia-aŭgusta Esperanto) venis pluraj protestaj reagoj. Pro tio ni aperigas alian prezenton de la sama libro, kiu aperis en la Katalogo de la paĝaro de edukado.net – <http://www.edukado.net>, la servo por subteni instruadon kaj lernadon de Esperanto.

La alloga libretto pretiĝis por sinteze prezenti la bazan gramatikon de Esperanto, ne tra plurcent paĝoj da preskribaj gramatikaj reguloj, sed tra la *Ekzercaro* de Zamenhof.

En la unua parto de la libretto la aŭtoro en la franca lingvo prezentas la 16 regulojn, aldonante siajn komentojn kaj ekzemplojn al la klarigoj.

La dua (pli ampleksa) parto okupiĝas pri la ekzercara materialo: sub la koncernaj paraĝrafoj legeblas la zamenhofaj frazoj, sekvataj ofte de komentoj kaj fine de la paraĝrafo legeblas vortlisto (E-o, franca kaj rusa) de la novaj vortoj de la koncerna ero. Tre plaĉaj kaj helpaj estas la piednotoj (entute 172), en kiuj la aŭtoro atentigas la leganton pri la klarigendaj fenomenoj de la ekzemplifrazoj, ofte rimarkante pri ne-logikaj, elementoj kiuj povas esti kontraŭdiraj de la antaŭe konigitaj reguloj.

La leganto ekscias ĉe kiuj lokoj la ekzercaraj frazoj ne plu estas same uzataj kiel en la tempo de la kreinto de la lingvo. Doniĝas ankaŭ sugestoj pri la nuntempaj uzendaj

formoj. La libreton finas la dulingva korelativa tabelo kaj listo de la radikoj, kun la indiko de la paraĝrafnumeroj en kiuj ili aperis. La verkon ni konsilas al tiuj, kiuj en mallonga tempo ŝatus ricevi trarigardon kaj simplan, klaran, tamen kompetentan gvidadon pri la funkcio de la E-gramatiko. Ĝi utilas ankaŭ por tiuj kursgvidantoj kaj esperantistoj, kiuj trovas, sed ne ĉiam komprenas *kio kial* estis uzata de Zamenhof, tiel kiel tio aperas en la ekzercaro.

Tre bona kaj alloga materialo ankaŭ por varbi kaj konvinki seriozajn interesiĝantojn pri la "arteferita" lingvo.

Opinio de la legantoj:

Boris Kolker: Pioniroj de Esperanto havis je sia dispono la

plej simplajn priskribojn de la nova lingvo. Malgraŭ tio, multaj el ili regis Esperanton tre bone. Marc Bavant prezentis la *Fundamenton de Esperanto* en nova lumo, provizinte ĝin per komentarioj kaj eltirinte regulojn el ĝiaj ekzemploj. Tre sprita provo, dank' al kiu la *Fundamento* transformiĝis, en la interpreto de Marc, en modernan lernolibron. Gratulon al la aŭtoro!

Ĉu tamen Fundamento en modernaj vestoj?

Laste aperis



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimumume 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

Antropozofia animkalendario. Rudolph Steiner. El la germana trad. Willy Nüesch. Berno: La tradukinto, 2003. 43p. 21cm. Dulingva (E, germana). Sentencoj por ĉiu semajno de la jaro. € 4,50

Ĉu vi parolas Esperanton? Baza lernolibro de la Lingvo Internacia. R. Imbert, T. Sekeli, I. Spoljarec, S. Štimec, Z. Tišljár, N. Rašić, C. Piron. En la polan trad. J. Handzlik. Bielsko-Biala: Kleks, 2002. 64p. ISBN 83 7194 356 3. 21cm. La Zagreba metodo por pollingvanoj. € 7,50. Triona rabato ekde 3 ekz.

Debuto de Paula Märthi, La. Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Iltis, 1998. 16p. ISBN 3 932807 07 3. 21cm. Kelkaj dokumentoj kaj personaj opinioj de la aŭtoro pri la skandalo *La Manto*. € 3,30

Dek fabeloj. Lernolibro por grupa legado aŭ hejma studado. Charlotte Kohrs, Dorothy Kruger. Iltis. Alan Henderson. San Diego: Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, 1986. 36p. ISBN 0 939057 09 3. 28cm. Deko da ilustritaj rakontoj por komencaĵoj, kun E-angla vortareto post ĉiu leciono. € 5,10

Esperanto raktas. Antanas Poška. Kaunas: Varpas, 2003. 95p. ISBN 998610 112 3. 15cm. Nova, moderna eldono de la litova ŝlosilo. € 4,50

Esperanto sen mitoj. Ziko Marcus Sikosek. Antverpeno: FEL, 2003 (2-a eld.). 367p. ISBN 90 71205 70 3. 21cm. Ilus. Jesoj kaj neoj por pli taŭga, pli sobra informado pri Esperanto. Kun ampleksa bibliografio. € 3,00

Homaro post 5040 jaro. La. Scienca fikcio. Gerard Cool. Pazarĝik: Radio, 2003. 209p. ISBN 954 684 086 6. 21cm. La lasta volumo de serio pri la estonteco de la homaro. € 9,90

Indianaj vizaĝoj de hodiaŭa Arizono. Kulturaj legaĵoj por progresantoj. Edwin Grobe. Tempe: Arizona Stelo, 2000. 28p.


22cm. Unupaĝaj tekstoj kun, ĉefine, vortareto. € 3,90

Informado pri Esperanto. Marco Picasso. Toruń: Flamo, 2002. 8p. 21cm. Manlibro por informadistoj pri Esperanto. € 3,00

Interlingvistiko kaj esperantologio: vojoj al la faka literaturo. Detlev Blanke. Rotterdam: UEA, 2003. 40p. ISBN 0085 2524. 21cm. E-dokumentoj n-ro 39E. Vojmontilo

Klaro kaj elasto. Fest-libro por la 80-a naskiĝtago de Fernando de Diego. 21 aŭtoroj. Editorio Irti kaj Reinhard Haupenthal. Schliengen: Iltis, 2003. 422p. ISBN 3 932807 26 X. 21cm. Pli ol 20 studoj lingvaj, literaturaj kaj movadaj. € 69,00

Kongresa libro de Universala Kongreso. Rotterdam: UEA, 2003. 112p. ISSN 0083 3851. 21cm. Manlibro kun detala programo pri



reeldono de rimarkinda kaj populara erotika libro, kies unua Esperanta eldono aperis en 1952 en Toulouse. € 9,90

Malstreĉite post 5 minutoj. Aŭtogeno trejnad por ĉiu tago. Anita Dröge, Brigitte Willand. El la germana trad. Karl Liebermann. Stuttgart: La aŭtoroj, 2003. 47p. ISBN 3 00 011614 1. 16cm. Trilingva (E, angla, germana). Kolekto de ekzercoj por fizika kaj mensa malstreĉiĝo. € 2,10. Triona rabato ekde 3 ekz.

Manlibro pri akupunkturo. Penj Jianjun. Hong Kong: Medicina Eldonejo, 2001. 155p. ISBN 962 8713 07 8. 22cm. Ilus. Prezento de la oficialaj normaj materialoj pri akupunkturo kaj moks, kun abunda indekso dulingva (E kaj ĉina). € 10,50

Mehrsprachiges Wörterbuch für die Ethnologie. Multilingual Dictionary for Ethnology. Gereon Janzing. München: Lincom, 2001. 193p. ISBN 3 89586 299 1. 24cm. Pli ol 1 200 kapvortoj rilataj al etnologiaj-antropologiaj en la germana, angla, franca, hispana, portugala, rusa kaj Esperanto. € 46,80


Militarto de Zun Zi, La. Sun Wu. El la ĉina Zeng Zhao-tian. Ĉina E-Eldonejo, 2003. 87p. ISBN 962 86613 8 8. 20cm. Dulingva (E, ĉina). La plej furia kompleta verko pri milita teorio en Ĉinio (ĉ. 2500 a.K.). € 9,00

Noo. Japana klasika dancdramo. T. Mikami. Kamekoma: Oomoto, 1963. 15p. 21cm. Enkonduko en kaj prezento de la japana klasika teatro. € 0,60

Originalaj poemoj de Zamenhof. L. L. Zamenhof. Seoul: Korea E-Asocio, 2003. 66p. ISBN 89 87281 10 8. 21cm. Dulingva (E, korea). Naŭ poemoj kaj unu parolado de Zamenhof, plus poemo de Grabowski, en originalo kaj korea traduko. € 3,30

Libro de amo. Rememoroj de Fanny Hill, virino de plezuro. John Cleland. El la angla trad. I.E.R. Japan (reprezo). 88p. 21cm. Japana

Per aktiveco ĉielen, arda pri idealoj. La vivo kaj agoj de Miyoshi Etsuo, prezidanto de



★ **KOREIO:** En la dua semestro de la kuranta jaro, 197 gestudentoj lernas Esperanton en la Universitato Dankook, kiu havas du universitatajn terenojn en Seulo kaj Conan. La leciono Esperanto estas oficiala lerno-objekto kun du notoj dum unu semestro. La kurso firme enradikiĝis en la universitato pro vama aliĝo de la studentoj, kiuj havas intereson pri Esperanto. Kiu volas korespondi kun ili, bv. lasi sian korespondon-peton en la hejmapaĝo www.esperanto.co.kr. (Libera-skrivo)

Docento LEE Jung-kee

★ **AMSTERDAMO:** Post modesta rekomenco en 2002 de la kurso pri interlingvistiko kaj Esperanto en la universitato de Amsterdamo, la ĉi-jara kurso altiras konsiderinde pli altan nombron da studentoj. La fako estas instruata kiel oficiala 10-ECTS-poenta elektofako en la subfakultato pri teoria lingvistiko. Danke al subtenantoj ekster la universitato la subfakultato povas proponi stagostipendion al studento kun lingvosciencia esplortasko dum la UK en Pekino. Kunlabore kun la Instituto Meertens ĝi planas por decembro 2003 la dua Amsterdaman interlingvistikalan simpozion.

Wim Jansen

★ **SUDA AFRIKO:** La Esperanto Asocio de Suda Afriko decidis klopodi por varbi pli da junaj lernantoj. Unu el la paŝoj por varbado estis la kreado de koloraj informiloj pri Esperanto. Kiel informiloj de aliaj organizaĵoj, ili donas mallongajn faktojn pri Esperanto, ties historio kaj utileco. Malfacilas konvinki malriĉajn afrikanojn pri la utileco de Esperanto. Esperantistoj estas sufiĉe disaj en Afriko, renkontiĝeblaj estas maloftaj pro manko de financo, afrikanoj ne povas ofte vojaĝi por ĝui kongresojn aŭ renkontiĝojn gemikojn. Kaj la malfacilaĵoj de la vivo ne donas al ili la



libertempon lerni la lingvon nur pro scivolemo. Pro tio, la faldfolio argumentas, ke indas lerni Esperanton por aniĝi en komunumo, kiu praktikas solidarecon. Ni petas niajn alikontinentajn samideanojn pravigi nin pri tio kaj esprimi sian solidarecon, per mesaĝoj de subteno, invito de afrikanoj al sia lando, aŭ donacoj al la Afrika Fondajo. Magali

★ **BJALISTOKO:** La 14-an de septembro 2003, okaze de la 490-a naskiĝtago de Podlaha Vojevodio en Bjalistoko, la naskiĝurbo de Esperanto, okazis surstrata festo, dum kiu ankaŭ esperantistoj forte reklamis Esperanton kaj ĝian kreinton Zamenhof. Oni disdonis foliojn pri Esperanto.

★ **OOSTENDE:** La 27-an de aŭgusto 2003 estis oficiale inaŭgurita nova *Esperanto-laan* (Esperanto-ŝoseo) en industria kvartalo de Oostende, Belgio. Estus bonvene mallonge gratuli la urbestron (s-ron Jean Vandecasteele), kiu ĉeestis kun pluraj skabenoj, pro tiu iniciato favore al la diskonigo de Esperanto. Oni povas gratuli en Esperanto (kun aŭ sen traduko al la nederlanda, franca, germana, angla) al la retadreso: stadbestuur@oostende.be.

Germain Pirlot

★ **IRANO:** Ĉiujare okazas en Irano gazetar-festivalo, kiun partoprenas enlandaj gazetoj kaj ĵurnaloj. La Esperanto-persa revuo *Sbazandishan* (Verdpensuloj) partoprenis en la ĉi-jara festivalo kaj ĝian budon vizitis altrangaj ŝtatoj, ministroj, politikistoj, famaj artistoj kaj ĵurnalistoj. Estis disdonitaj pli ol 16 000 informiloj pri E-o, okazis 5 prelegoj kaj multaj ĵurnalistoj kaj interesatoj enskribiĝis en E-kursojn. La dua plej granda irana tagĵurnalo *Irana* aperigis raporton pri la prelego de Ahmad Reza Mamduhi pri

Esperanto kaj foton de la irana prezidento apud E-flago ĉe la budo de la revuo. La plej fama revuo por adoleskuloj *Surush-e Nog-havan* faris intervjuon pri Esperanto kun Reza Torabi, la ĉefredaktoro de la revuo, kaj planas lanĉi E-kurson

★ **KUBO:** Esperanto-redakcio de Radio Havano, Kubo, invitas vin aŭskulti E-elsendojn per Real Audio

ĉiudimante je la 15-a horo UTC ĉe: <http://216.138.240.229/rc4> kaj viziti la retpaĝojn <http://www.radiohch.com>. [reagoj bonvenaj ĉe: radiohc@net.cu].



Fake

★ **MACWORLD:** En la ĉi-jara septembra eldono de la revuo *MacWorld*, p. 35 (vidu la supran bildon), estas recenzo pri la programo *Acrobat 6* de Adobe, en kiu la aŭtoroj uzis Esperanton por montri la eblecojn de *Acrobat*. Sendube tre bona reklamo por Esperanto. Stano NG

★ **VIKIPEDIO:** La reta enciklopedio Vikipedio (www.wikipedia.org) nun estas elŝutebla (nur 5,4 MB) kaj vi povas legi ĝin en via (poŝ)komputilo per speciala programo. Pliaj detaloj ĉe http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Elŝuti_la_Vikipedion. La Esperanto-sekcio de la projekto jam havas 7500 artikolojn kaj atendas ankaŭ vian kunlaboron!

Chuck Smith
msochuck@yahoo.com

★ **ESPTAPI** estas senpaga voĉlega softvaro por Esperanta teksto, utila al blindaj, sed ankaŭ vidantaj esperantistoj, kiu servas por komputile voĉlegi Esperantan tekston. Ĝi funkcias sur persona komputilo laŭ Vindozo kaj elparolas helpe de la programoj *Text-to-speech engine Italian* kaj *Microsoft Agent* (ambaŭ utiligeblaj senpaga). Legu pli en <http://monto2000.hp.infoseek.com/soft/esptapi.htm>. Viajn raportojn atendas:

Yamano Toshio
yamano@age.ne.jp

★ **TELEVIDO:** Loka televida stacio *NET-TV* de Maribor, Slovenio, atingebila de duonmiliono da spektantoj, surbendigis rondtablan diskuton pri *Europa identeco kaj egalrajteco de nacioj en EU*. La elsendon gvidis prezidantino de Esperanto-Societo de Maribor Melita Cimerman kaj gastoj estis Zlatko Tišljari, Vinko Ošlak (esperantistoj) kaj Janez Dular (eksa kulturministro de Slovenio). En unuhora diskuto oni plurfloje menciis Esperanton kiel solvon por defendi malpli grandajn naciojn sub la danĝero de malapero en Eŭropa Unio. La diskuto estis elsendita trifoje: la 12-an, 13-an kaj 14-an de junio 2003.

Zlatko Tišljari

Swany Korporacio. Kagaŭa-Ken: Miyoshi Etsuo, 2003. 65p. 15cm. Paĝoj el la vivo de sukcesa negocisto kaj Esperanta mecenato. € 2,10. Triona rabato ekde 3 ekz.

Poemoj kun dediĉoj. Anna Kowara. Toruŝi: Flamo, 2002. 32p. ISBN 83 903215 6 4. 20cm. Sopirveka poemaro de sentema poeto. € 4,50

Postdomo. La. Paŭsaĵo. István Ertl. Ilus. Francisco Vuelthy. Rotterdam: Bero, 2003. 85p. 18cm. Humurplena satira romaneto (kun movada fono) en kiu "fikcio kaj realo koincidas". € 9,00

Raportoj el Japanio 6. Jasuo Horŝi. Tokio: Libroteko Tokio, 2003. 166p. ISBN 4 947728 25 6. 21cm. Kun desegnaĵoj. Mallongaj raportoj pri diversaj aspektoj de la japana vivo. € 13,50

Rekviemo por Nils-Erik. Kerstin Kristoferson. Skara: La aŭtoro, 2003. 32p. ISBN 91 631 3789 5. 21cm. Versoformaj kvazaŭpaĝoj el taglibro, kun tradukoj en la svedan, germanan kaj anglan; rekviemo por mortinta edzo. € 4,80

Sensortecore. Imre Kertész. El la hungara trad. István Ertl. G. Gőrgyey, salutvortoj: H. Tonkin, antaŭparolo. Budapest: Aranygyöngy 2002, 2003. 207p. ISBN 963 206 217 5. 20cm. Bind. Numero 37 en la serio Oriento-Okcidento. Pli ol memorigebla inspirita transviv-rakonto elkoncerte: romano kiu elmontras la kapablon de la homo adaptiĝi al ĉirkaŭstancoj, sistemoj kaj reĝimoj plej malhomaj. Nobel-premiita en 2002. € 13,50

Spiritaj dialogoj por la konversakursusoj. Edwin Grobe. Tempe: Arizona Stelo, 2000. 28p. 22cm. Dudeko da simplaj dialogoj. € 3,90

Survejo al Esperantujo. Elvira Fontes. São Paulo: Amikoj de Esperanto, 2000 (2-a eld.). 72p. ISBN 85 85795 32 8. 21cm. Dekvilinecna kurso por klasa uzado, kun eta krestomatiko de legaloj. € 3,00

Tilla. Spomenka Štímac. Pise: Edistudio, 2002. 179p. ISBN 88 7036 071 7. 21cm. Kun fotoj. Romano pri la vivo de la aŭstri-hungara aktorino Tilla Durieux. € 15,00

Tradukarto kaj ties problemoj. La. André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2003. 35p. 21cm. Konsililoj por eventualaj tradukistoj de la franca al Esperanto. € 4,50

Travivaĵoj de eminentuloj. Trad. Hermann Schalk. Wien: Aŭstria Esperanto-Movado. 16p. 21cm. Tri tekstoj de Peter Rosseggar, Juri Gagarin kaj Rudolf Diesel. € 2,70

Tri frato Teoristo. La. Detektiva rakonto. Jeronimas Laucius. El la litova trad. Valdas Banaitis. Vilnius: Tri steloj, 2003. 16p. ISBN 9955 454 53 9. 29cm. Ilustrita de glemantoj de la lita lernejo de Vievis. Edukplena fabelo en kiu fikcio interplektiĝas kun elementoj de realo. € 4,50

KOMPAKTDISKOJ, VIBENDOJ

Elektronikaj libroj en Esperanto. Tyresö: Inko, 2003. Pli ol 200 libroj en formato PDF, legeblaj per *Acrobat Reader*. KD. € 18,90

Eŭska lingvo de runaj sorĉoj. La. Solo. Málaga: la aŭtoro, 2003. 75 min. Komparo inter la eŭska kaj runa lingvoj, historio de Eŭskio, sorĉaj ritoj, problemoj de nuna Eŭskio k.a. Kun muzika fono. KD. € 15,00

Mia nomo ne gravas. Elektitaj kantoj de Mikaelo Bronštejn. Moskvo: REU, 2003. Kun tekstobroŝuro. 26 min. La kvina volumo de la serio "Oraj kantoj"; 18 muzikajoj de la rusia bardo. KD. € 13,50

Prof. Reinhard Sellen intervjua de Rainer Kurz. Thomas Bormann, parolisto. Bonn / Stuttgart: Rainer Kurz, 2003. 55 min. Intervjuo kun Nobelpremiito por ekonomiko 1994; kun muzika fono. Vибendo (PAL kaj NTSC). € 11,40

Yumeltho Terapio. Scienca-klinikaj raportoj 1987-2002. Tokio: Yumeltho-Centro, 2003. Pli ol 30 raportoj pri uzo de Yumeltho-terapii en kuracado de diversaj san-problemoj. KD legebla per PC. € 18,00



NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Brazilo: Neusa Priscotin Mendes. Britio: Duncan Thomson. Usono: Darlene F. Evans, Anita Mills, Kiho Pai, Robert Smalles.

SOCIETO ZAMENHOF 2003

Germanio: H. Georg Macioszek. Hispanio: Josep Castellfort i Riba. Japanio: Yamasaki seiko. Kanado: Bruce R. Crisp, Marijke Meijer-Brandsma, Stevens Norwell. Nederlando: Ru H. Bossong, Danny ten Haaf, Joop W. Moonen. Slovakio: Ilona Seres. Svedio: Leif Holmlund. Usono: Joel Amis, Margaret L. Barkley, D. Gary Grady, Lusi Harmon, William R. Harmon, Reginald W. Jaderstrom, Gertrude M. Novak, Julie L. Regal, Bruce A. Sherwood, Robert A. Swenson, Arnold Victor, David T. Wolf.

NOVAJ PATRONOJ DE TEJO 2003

Belgio: Antoine J. Mechelynck. Israelo: Gian Pierr Savio, Jehoŝua Tilleman. Nederlando: Danny ten Haaf.

DONACIOJ 2003 (EUR)

Ĝis la 30-a de junio

Kapitalo Afriko: Britujo: A. Nonima 353,07. Japanio: S. Mitukawa 144,40. Nederlando: F.H. Kat 50,00; F.J. Pietersen-Kruger 500,00; F.D. van Zoest 12,50. Sumo ĉi-jara: 6134,87.

Konto Afriko: Japanio: S. Aikawa 21,66; H. Ogura 1,45; K. Syozi 72,20; Y. Takeuti 36,10. Nederlando: D. Krombeen 100,00; J.C.J. den Toonder 25,00; J.G.L.M. Verheijen 500,00; H. Wernik 10,00. Svedio: J. Hammarberg 86,48; Norrkopings E. klubb 24,86. Sumo ĉi-jara: 1931,62.

Fondaĵo Ameriko: Finnlando: H. Kesälä 150,00. Germanio: F.M. Reisel 150,00. Kanado: B. Crisp 29,54; Kanada E-Asocio 300,00. Nederlando: R. Moerbeek 100,00. Norvegio: E-

grupo Trondheim 100,00. Svedio: J. Hammarberg 54,05. Sumo ĉi-jara: 1468,69.

Fondaĵo Azio: Japanio: K. Hirose 14,44; T. Itabasi 14,44; T. Maekawa 14,44. Sumo ĉi-jara: 1125,08.

Fondaĵo Canuto: Francio: C. Longüe Épée 9,45. Nederlando: T. van Huis-Startitsy 25,00; A.E. Moerbeek-Prins 50,00; F.J. Pietersen-Kruger 50,00. Sumo ĉi-jara: 1353,24.

Konto Espero: Germanio: U. Niesert 50,00. Italio: R. Corsetti 50,00. Nederlando: T. van Huis-Startitsy 50,00. Sumo ĉi-jara: 1647,18.

Fondaĵo Junularo: Francio: C. Longüe Épée 47,25; C. Castillon 3,80. Meksiko: A.M. Greene 4,75. Svedio: C. Farm 10,81; Y. Guo 2,71; P. Ostling 2,70. Svislando: R. Ernst 23,33. Usono: G.W. Partlow 8,58; A.C. Boschen 20,16. Sumo ĉi-jara: 541,94.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Aŭstralio: Federacio de Novsudkimrio 94,50. Italio: L. Fabretto 700,00. Svedio: A.L. Akerlund 54,05; D. Carlsson 10,81; K. Hansen 108,11; A.K. Krondhal 21,62; R. Larsson 54,05; Norrköpinga E-klubo 54,05; H. Vedin 54,05. Sumo ĉi-jara: 4198,06.

Volontula Fondaĵo: Nederlando: F.J. Pietersen-Kruger 50,00. Sumo ĉi-jara: 241,90.

Ĝenerala Kaso: Germanio: M. Scherm 10,00. Nederlando: A.J. Korlage de Jong 5,00. Sumo ĉi-jara: 355,23.

Konto Etiopio: Kanado: B. Crisp 88,61. Nederlando: N.C. Kuiterman van Goor 50,00. Sumo ĉi-jara: 617,59.

Konto Edukado/Wüster: Francio: G. Martin 30,00. Sumo ĉi-jara: 279,01.

Al ĉiuj tre horan dankon! UEA

Anoncetoj

1 vorto = 1 internacia rpk (€ 0,75). Ni ne respondas pri la enhavo. Ripeto ne rajtigas rabaton. Pri korespondetoj zorgas ankaŭ Korespond Servo Mondsala, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio, www.multimania.com/kosomo.



Serĉas nacilingvajn tradukojn de *Al la juda forinto* (Dejj): Lili Giloteaux, 3 allée Béranger, FR-59170 Croix, Francio.

Wuhan Esperanto-Asocio esperas ĝemelilati kun lokaj E-organizaĵoj tutmonde; 19 gekursanoj 18-60-jaraj tre deziras korespondi kun E-geamikoj ĉieaj: p/a MO yhi xiong, Xiang-Xie-Li-She Xiao-Qu 1-1-601 Shi, Shen-Long-Street Te 1 Hao, W.E.D.Z. CN-430056 Wuhan, Ĉinio. Respondo certa!

Elkoran dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis al la fondaĵo Etiopio. Pro via malavareco eblis sendi

EUR 1066,45 (kun la nomo *Esperanto-helpo*) pere de la Nederlanda Ruĝa Kruco al la malsatantoj en Etiopio.

14-jara knabino volas korespondi kun gesamideanoj. Interesatoj skribu al: Mahbuba M. Atai, Poŝtkasto 95715-188, Torbate Jam, Irano.

Geedziĝo: La prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, Andreas Emmerich, kaj Olena Payuk el Ukrainio geedziĝis la 19-an de julio en Brombachal (Germanio). Elkorajn gratulojn!





Primavero en Tobolsk

Antikva rusa siberia urbo Tobolsk, fondita en 1587, do 300 jarojn antaŭ la apero de Esperanto, gastigis partoprenantojn de regiona Esperantenkontigo. Ĝi kunvenigis 33 partoprenantojn el 11 urboj de 7 gubernioj.



La ĉefa temo de la renkontiĝo *Regiona agado: direktoj kaj perspektivoj* estas tre aktuala temo por Rusio, pro la grandegaj distancoj inter diversaj partoj de la lando. Sed renkontiĝi kaj paroli en Esperanto, interŝanĝi spertojn kaj informojn, kaj pridiskuti problemojn, bezonas ĉiuj esperantistoj. La ĉeestantoj aŭdis raporton pri la ĉefa

temo, kiun faris Viktor Kudrjavcev, REU-estrarano pri la regiona agado en Rusio, informojn, kiuj prilumis diversajn manierojn organizi E-agadon surloke kaj opiniojn por plibonigi kaj plintensigi rilatojn inter esperantistoj el najbaraj urboj. En la prelegserio oni informis ankaŭ pri *Nuna stato de la E-movado en Rusio* kaj *Panoramo de la rusiaj E-gazetoj*. La partoprenantojn tre

impresis leciono de profesia instruisto Vladimir Opletajev *Parolu en Esperanto klare kaj bele*.

La ĉefan parton de la kultura programo konsistigis vespera koncerto de poeto, gitaristo kaj komponisto Anatolij Radajev, kiu prezentis siajn kantojn, du librojn kaj 3 kompaktdiskojn en Esperanto.

Dum vespera programo regis vere amika etoso; oni prezentis teatraĵetojn, humuraĵojn, talenta poeto Gaŭr Gazizi legis siajn poemojn, ĉiuj kune kantis kaj dancis. La interkomunikado daŭris ankaŭ malfruvespere, kiam okazis teumado ĉe la komuna tablo en agrabla etoso.

Esperantista programo alternis kun ekskursoj al la plej orienta en Rusio Tobolska Kremlo, domo, en kiu loĝis la lasta rusia caro Nikolao la Dua, kaj aliaj vidindaĵoj. Ĉiujn ravis ekskursoj al Eklezia Supera Lernejo kaj ikon-arta metiejo.

Bona rezulto de la renkontiĝo estis fido de iniciata grupo, kiu kunordigos la komunan agadon, gvidos al ĝia plia vigligo, kaj lanĉo de diskuto pri problemoj de regiona agado sur la paĝoj de *Rusia Esperanto-Gazeto*.

La reagoj de la ĉeestantoj al la okazigitaj aranĝoj en antaŭpreparita Reflekta tabelo estis pozitivaj kaj montris intereson aranĝi similan renkontiĝon sekvontprintempe.

Rafija Kudrjavceva

Prilepa Foiro

La diverskampe aktiva Esperanto-societo *La Progreso* en Prilep, Makedonio, festas ĉimonte la 40-an datrevenon de sia ekzisto.

De la 9-a ĝis la 10-a de majo en Prilep okazis Foiro por malgrandaj firmaoj kaj neŝtataj organizoj. La foirejo estis en la loka sporhalo Makedonija.

Inter 40 firmaoj kaj 20 neŝtataj organizoj partoprenis en la foira ankaŭ Esperantaj societoj *La Progreso* kaj *Estanto* el Prilep, kun memstara stando kaj informtabulo.

La societoj prezentis siajn eldonaĵojn, fotojn, dokumentojn, flugfoliojn pri Esperanto – kaj specialan 10-minutan prezentan komputilan materialon. La verdan standon dum du tagoj vizitis 500 samurbanoj, al kiuj oni disdonis 300 flugfoliojn kaj esperantaĵojn.

Viktor Galeski



Konsultiĝo en Meza Eŭropo

Laŭvica Konsultiĝo de landaj reprezentantoj de Mez-Eŭropaj Esperanto-Asocio okazis en la tagoj 12-14 sept 2003 en Gliwice, Pollando.



Foto: Stano Martek

Stanisław Mandrak (staranta) bonvenigas la urbestron (maldekstre).

Partoprenis ĝin, krom la gastigantoj, reprezentantoj el Ĉeĥio, Slovakio, Hungario kaj Kroatio. UEA-n reprezentis s-ino Michela Lipari. La delegacioj pridiskutis diversajn aferojn

ligitajn al la Esperanto-movado en koncernaj landoj. Estis preparolita la situacio kaj defendo de la lingvoj post la membriĝo al la strukturoj de EU. Dum la konsultiĝo estis proponita 3-persona

komitato por gvidi la agadon de Mezeŭropa Komisiono: Stanisław Mandrak (Pollando), Juraj Gondžur (Slovakio) kaj Spomenka Štivec (Kroatio). La konsultiĝon patronis la urbestro de la urbo Gliwice kaj raportis pri ĝi kelkaj lokaj kaj regionaj gazetoj.

Stanisław Mandrak

Rezolucio

La reprezentantoj de Mez-Eŭropaj Esperanto-Asocioj, kunvenintaj en Gliwice, Pollando, inter la 12-a kaj 14-a de septembro 2003,

traktante la temon *Lingva komunikado en la plivastiĝanta Eŭropa Unio* konstatis, ke la problemoj de lingva komunikado eĉ pliakriĝos post la disvastigo de EU, pro tio

alvokas la respondecajn instituciojn de membro-ŝtatoj nunaj kaj estontaj, solvi la lingvan komunikadon ene de Eŭropa Unio laŭ sia baza principo, nome egalrajteco de ĉiuj civitanoj kaj ties lingvoj,

proponas tiucele Esperanton, la neŭtralan internacian lingvon,

postulas la elektelecon de la lingvo Esperanto en ĉiuj niveloj de ŝtata lingvoinstruado.

Gliwice, la 14-an de septembro 2003

La Unua Nordorientĉina Kongreso

En la okdekaj jaroj de la lasta jarcento, esperantistoj de la municipoj Pekino kaj Tianjin, kaj la provincoj Hebei, Shandong kaj Liaoning jam komune aranĝis somerajn semajnojn en pitoreskaj lokoj kiel la Somera Palaco de Pekino, la plaĝoj de Xingang (Nova Haveno) de Tianjin, la turisma urbo Qinhuangdao, la Maŭzeo de Ĝingisĥano, kaj proponis okazigi regionajn kongresojn pro tio, ke Ĉinio estas tro vasta por okazigi landajn kongresojn.

Efektive jam okazis regionaj kongresoj en la lasta jardeko en la regionoj de Nordorienta kaj Nordokcidenta Ĉinio. Jus okazis ankaŭ la Unua Nordorientĉina Kongreso de Esperanto en la Pekina Lingva Universitato.

La kongreson ĉeestis delegitoj de E-societoj de Pekino, Tianjin, la provincoj Hebei, Henan, Shandong, Shanxi, Liaoning, Jilin, Anhui, Jiangsu kaj Fujian, kaj la Aŭtonomia Regiono de Interna

sadoro de Ĉinio en Usono, kuraĝigis la junan generacion per sia parolado. S-ino Shi Mei, vicprezidanto de la Pekina Federacio de Socienciaj Asocioj, salutis la kongreson kaj rikoltis varman aplaŭdon por siaj vortoj en Esperanto. Post la inaŭguro plejparto de la ĉeestantoj kune fotiĝis flanke de la kongresejo.

Posttagmeze okazis prelegoj. Akademiano Li Shijun prelegis pri Esperanto kiel lingvo por tradukado de beletraĵoj, prof. Zhou

Liuxi prelegis pri *Interlingvistiko kaj esperantologio*, kaj prof. Li Weilun parolis pri *Instruado de Esperanto en superaj lernejoj*. La 31-an de aŭgusto okazis spert-interŝanga kunsido sub prezidado de akademiano Li Shijun, kaj konsilio pri preparoj por la 89-a UK en Pekino. La kongreso mobilizis esperantistojn en Ĉinio por fari bonajn preparojn por la 89-a UK en Pekino.

V. Kanto



D-ro Guillermo Alfredo Cook (1919-2002), vicdelegito (1989-97), delegito (1998), fakdelegito (1999-2001), forpasis la 5-an de oktobro 2002 en Caracas (Venezuelo). Li estis Honora Membro de Venezuela E-Asocio, Membro-Fondinto de la Kultura Fondaĵo Esperanto, tradukinto de *Kumeaŭa* al la hispana kaj la financanto de ĝia unua eldono.

Santiago Alvarez-Gutierrez (1936-2003) mortis fine de marto en Bogoto, Kolombio. Li estis la ĉefa motoro de la Kolombia Esperanto-movado dum la lastaj du jardekoj, la plej aĝema kaj diligenta kunveniganto de la kolombiaj esperantistoj.

Roger Destabelle (1929-2003), delegito (1989-2003), forpasis en Fleurus (Belgio). Inter liaj multaj aktivadoj estis rete programitaj kursoj, instruado en vesperaj kursoj en lernejo *Bosquetville* kaj funkcio de sekretario de Asocio por Esperanto en Valonio.

Jean Dettwiller (1932-2003), delegito kaj fakdelegito pri kemio (1987-2003), membro de la klubo "Bona Stelo" en Romans, mortis aŭguste en Saint Apollinard (Francio).

Antoni Golonka (1934-2003), membro de 1961, ĉefdelegito (1991-2002), membro de Ĉefa Estraro de Pola E-Asocio. E-instruisto, gvidanto de E-kursoj kaj seminarioj en Miedzygórze, mortis en Gliwice (PL). Honorigita de Pola E-Asocio per titolo *Merita Esperantisto*, de Pola Kulturministerio *Merita Kulturaganto*.

Yves Guénia, dumviva membro, forpasis la 11-an de septembro 2003 en St Pierre Bois (Francio).

James L. Harwood (1918-2003), prezidanto kaj kasisto de la Nov-Sud-Kimria Federacio, mortis en Sidnejo (Aŭstralio).

Henning Hauge (1935-2003) mortis dum aŭtoakcidento la 7-an de aŭgusto 2003.



Membro, Honora Membro de FISAIC, kaj posedanto de ĝia Ora medalo.

Hang Jun (1943-2003), redaktoro de E-elsendoj de Ĉina Radio Internacia (1972-2003), volontulo en la CO de UEA (1989) forpasis la 25-an de junio.

Stig Kinnander (1915-2003), membro de la Sveda E-Asocio kaj ĝia sekcio de KELI ekde 1961, forpasis en Tibro (Svedio). En la jaroj 1983 ĝis 2000 li tre aktive organizis interalie 27 veturojn al Pollando kun nutraĵoj kaj medikamentoj.

Ivan Ko, ĉina veterana esperantisto, kiu sin okupis pri korespondado de EPC dum deko da jaroj, forpasis en la aĝo de 89 jaroj la 9-an de marto 2003.

Fay F. Koppel (1912-2003), dumviva membro, mortis la 10-an de junio en Clifton Hill (Aŭstralio). Kune kun la edzo ŝi multe laboris por E-o en Melburno kaj verkis ekz. *De Z al A* (1978) pri la E-literaturo. La Aŭstralia E-Asocio honorigis ŝin per titolo *Fratulo*.

Tomasz Jan Kudrewicz (1954-2003), fakdelegito pri komputiloj (1983-2003),

Honora Ano de Monda Turismo, dum dudek jaroj direktoro de Centra Oficejo de Monda Turismo kaj Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz, prezidinto de Pola E-Junularo, eksestrarano de Pola E-Asocio, redaktoro de multaj E-eldonaĵoj, mortis la 19-an de aŭgusto en Bydgoszcz (Pollando).

Sigmund Kveim (1921-2003), membro de la instruista sekcio de Norvega E-Ligo, mortis en Gol (Norvegio).

Prof. Josef Manninger (1920-2003), dumviva membro, mortis en Graz-Andritz (Aŭstrio).

Dmitrij Aleksandroviĉ Perevalov (1951-2003) mortis en Malojarslavec (Rusio) la 3-an de junio. En la 1980-aj jaroj li estis unu el la plej viglaj motoroj de la sovetia movado, estrano de ASE, prezidanto de Moskva Centra E-Klubo kaj gvidanto de Sovetia sekcio de Mondpaca Esperantista Movado (MEM).

Ryūie Samura (1940-2003), la ĉefdirektoro de Japana Budhana Ligo Esperantista (JBLE, ekde 1990), bonzo de zen-budhismo, forpasis la 23-an de marto.

Etuzo Sato (1911-2003) forpasis en Hukuoka (Japanio). Li esperantistigis en Koreio en 1929, en UEA membris de 1958 ĝis 2001.

D-ro Manfred Uhlendorf (1920-2003) forpasis junio en Kassel (Germanio).

Renhu Wang (1938-2003), honora prezidanto de Liaoning-provinca E-A (LEA) en Ĉinio, direktoro de la redakcia komitato de la LEA-organo *Verda Stelo*, forpasis la 22-an de aŭgusto. Li organizis diversajn kursojn, i.a. radio-televidan, E-seminariojn, kunlaborante kun aliaj esperantistoj verkis kaj eldonis librojn pri E-o. (ekz. *Konciza Gramatiko de Esperanto* - 1987).

Krucenigma konkurso

Nova krucenigma aperos en la novembro revuo. Solvo el la marta revuo: *Hundo bojas, homo vojas. Post damaĝo venas saĝo.*

La solvojn sendis:



A.M.Oosterwijk, Nederlando; Adolf Burkhardt, Germanio; Akada Joŝihisa, Japanio; Andrej Grigorjevskij, Rusio; Angus Wilkinson, Britio; Anja Karkiainen, Finnlando; Aoyama Tooru, Japanio; Astrid Birkbak, Danlando; Celio A.S. Brandao, Brazilo; Christian Rivière, Francio; Christoph Brandes, Germanio; Daniel Luez, Francio; Dieter Dungert, Germanio; Dieter Rooke, Svislando; Edmund Grimley Evans, Britio; Erkki Kempainen, Finnlando; Ester Olsen, Norvegio; František Štoviček, Ĉeĥio; Gerrit Brons, Nederlando; Grethe Kvist, Danlando; Grozdenka Filipova, Bulgario; Hazel Green, Aŭstralio; Horst Vogt, Germanio; Jackie Huberdeau, Francio; Jean-Marie Ries, Luksemburgio; Jean-Thierry von Büren, Svislando; Josef Šemer, Israelo; José Mauro Progiante, Brazilo; Julian Ducrocq, Francio; Jurij Petroviĉ Kivajev, Rusio; Karin Lencki, Germanio; Kees Neef, Nederlando; Keyhan Sayadpour, Irano; Kitty Sicherman, Israelo; Kurt Niederbroker,

Germanio; Laimundas Abromas, Litovio; Ljoŝa Kuznecov, Rusio; Lucien Gilteaux, Francio; Luiza Marin, Francio; M. Paul Lafont, Francio; Malcolm Jones, Anglio; Malka Zemeli, Israelo; Manuel Casanoves, Hispanio; Maurice Gourichon, Francio; Mihail Selestov, Belorusio; Mihailo Nešić, Serbio/Montenegro; Milan Smělý, Ĉeĥio; Mo Zhi-xiong, Ĉinio; Neal McKown, Usono; Neil MacKiligin, Anglio; Otto Prytz, Norvegio; Pavol Petrik, Slovakio; Pekka Välimäki, Finnlando; Pierre/Michelle Royer, Francio; Pieter Jan Doumen, Belgio; Roland Larsson, Svedio; Roland Thibault, Usono; Vladimir Gakalenko, Ukrainio; W. R. Harmon, Usono; Werner Bormann, Germanio; Will White, Usono kaj Zdeněk Hřel, Ĉeĥio.

La libropremion gajnis: Celio A. S. Brandao el Brazilo. Elkoran gratulon!

Festu kun ni la 20-jaran jubileon!

La familia aranĝo dum pasko en Germanio

Printempa Semajno Internacia

Aranĝo de Germana Esperanto-Asocio

INFORMOJ

Wolfgang Bohr, Joh. Kirschweg-Str. 11, DE-53474 Ahnweiler
tel.: +49/2641/4885 retpoŝto: psi@esperanto.de
interreto: http://www.esperanto.de/psi

La unua aliĝperiodo finiĝas je 30/11/2003


lernu per esperanto pri la tero




Estigo de la tero kaj de la homo. Leander Tell. Populara skizo pri la esploroj kaj teorioj malantaŭ la hodiaŭa koncepto de evolucio. Ilustrita. La Laguna: J. Régulo, 1969. 124p. 19cm. € 3,00.



El la polvo de la tero. Enkonduko en grundosciencan. William Frederick Rolt. Belstila prezento de la ecaro de la grundo, kaj rigardo al ties sekvoj por la nutrado de la homaro. Kun glosaro. Ilustrita. La Laguna: J. Régulo, 1967. 134p. 19cm. € 3,00.



Bela subtera mondo. La. Libro pri grotoj. Leander Tell. Ilustrita per belaj fotoj de naturfenomenoj kaj arĥeologiaj trovaĵoj en grotoj tra la tuta mondo. La Laguna: J. Régulo, 1959. 95p. 24cm. € 3,00.



Ĉu vi konas la teron? Endre Dudich. Altnivela enkonduko en la geologion kun abundaj figuroj kaj tabeloj. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro de UEA, 1983. 150+68p. 23cm. € 4,20.

triona rabato por kia ajn kombino de tri libroj ĉi-supraj (identaj aŭ ne)!

VORTLUDE KAJ ALUDE

ESPERANTA FRAZELOGIO de Sabine Fiedler


Esperanta frazeologio kiel spegulo de kulturo. Pri la ekesto kaj evoluo de frazeologio en Esperanto kaj aliaj planlingvoj, kompare kun tiuj de etnolingvoj.



Rotterdam: UEA, 2002. 185p. 21cm. Prezo: €19,80. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

ĈU VI VOLAS DEFENDI ESPERANTON TRAFE?

Lernu el tiu ĉi DISKUTLIBRO POR MALPLI UZATAJ LINGVOJ unue eldonita de la Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj.



Diskutlibro pri malpli uzataj lingvoj de Jordi Bañeres kaj Miquel Strubell. Trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 2002. 59p. 22cm. Prezo: €7,50. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

DE PLANO AL EFEKTIVECO



Ok studoj pri la demando kiel planlingvo evoluas al efektiva lingvo. Libro eldono de la n-ro 2000/3-4 de *Interface, Journal of Applied Linguistics*.

Planned Languages: From Concept to Reality. De Smet, Schubert, Tonkin, Blanke, Duc Goninaz, Koutny, Liu Haitao, Corsetti, La Torre, van Oostendorp. Red. Klaus Schubert. Brussel: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst, 2001. 257p. ISBN 806813 1 8. 24 cm. Diverslingva: angla, Esperanto, franca, germana, nederlanda. € 24,00.

ŜLOSILO AL 1286 GASTLOKOJ

La plej populara eldonaĵo de TEJO, la listo de esperantistaj gastigantoj *Pasporta Servo*, aperas ekde 1974. Ĉi-jare ĝi enhavas 1286 adresojn en 80 landoj, sur 210 paĝoj.



La gastigantoj ricevas ĝin senpage. La aliaj povas mendi ĝin kontraŭ 15 EUR + sendokostoj (kun triona rabato ekde tri ekz.) ĉe la Libro-servo de UEA.

Por aliĝi kiel gastiganto, petu aliĝilon de UEA, de la kompilinto aŭ de la landaj organizantoj.

Pliaj informoj ĉe la kompilinto: Derk Ederveen, Westenburgstr. 15, NL-2275 XR Voorburg, Nederlando, paspaserv@wx.nl, aŭ ĉe: www.esperanto.net/ps.